Demain nous mangerons de bonne heure. J'écrirai à mon oncle. Ils finiront leurs devoirs demain. Les élèves auront de nouveaux livres. Je verrai mes chers amis avec grand plaisir. Après la leçon les élèves sortiront et joueront dans la cour. J'espère que vous me comprendrez. Prendrez-vous votre manteau? Voudrez-vous me prêter ce livre? Après-demain, la bonne lavera sa chambre. Quand le vitrier pourra-t-il venir? Le maître vous interrogera-t-il aujourd'hui? Demain nous aurons un nouveau professeur, car notre maître devra faire un petit voyage. Quand le maître parlera, écoutez-le. Mon frère devra-t-il partir de bonne heure? Quand vous ne me verrez plus, vous m'oublierez. Ne cherchez pas votre sœur : quand vous ouvrirez la porte, vous la verrez. Quand vous viendrez, je vous montrerai le jardin de notre voisin. Si vous venez, je vous montrerai le jardin de notre voisin. Quand mon frère viendra, nous nous promènerons. Si mon frère vient (viendra), nous nous promènerons. Quand le temps sera vilain, nous ne sortirons pas et nous lirons. Si le temps est vilain demain, nous ne sortirons pas et nous lirons. J'espère que vous apprendrez votre leçon. Le maître ne sera pas content si vous ne la savez pas, et il vous grondera et vous punira.



## DIXIÈME LEÇON

### Verbes en igi.

#### Malbona kamarado.

tial, ke, *parce que* jam, *déjà*

Hieraŭ la servistino vekis min kaj levigis min je la sepa. Ŝi ne bezonis eklumigi la lampon, tial ke



la suno jam brilis, sed ŝi ekbruligis la fajron por pretigi mian ĉokoladon. Je la oka mi iris en la lernejon, kie mi pasigas grandan parton de la mateno. Mi estis tre atenta, tial ke la atento multe progresigas la lernantojn. La kurso finiĝis je la dekunua, kaj mi iris hejmen kun mia kamarado Maŭrico.

Dum la reveno, Maŭrico sciigis min (*ou* : al mi), ke li iris por ĉasi kun sia patro kaj volis kredigi al mi, ke li mortigis mem du leporojn. Li certigis tion al mi, sed mi ne volis kredi, tial ke li ofte fanfaronas.

Tio kolerigis lin, kaj li minacis al mi, por min timigi, ke li batos min. Li ne batis min, sed dum ia bruo atentigis min kaj igis min deturni la kapon, li puŝis min kaj faligis min.

Mi falis, kaj la piedo doloras min. Tiu malbona konduto de mia kamarado Maŭrico tre ĉagrenis min. Mi reeniris en mian domon, mi pendigis mian mantelon en la vestŝranko, mi purigis miajn manojn, kaj mi banis kaj vindis mian piedon.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kiu vekas vin? — 2. Je kioma horo la servistino vekis vin hieraŭ? — 3. Ĉu ŝi bezonis eklumigi la lampon? — 4. Kial ŝi ekbruligis la fajron? — 5. Kiu pretigas vian matenmanĝon? — 6. Kie vi pasigas la pli grandan parton de la mateno? — 7. Kial estas necese, ke la lernantoj estu atentaj? — 8. Je kioma horo finiĝas la kurso? — 9. Kien vi iras, kiam la kurso finiĝis? — 10. Kion sciigis vin Maŭrico dum la reveno? — 11. Kion li volis kredigi al vi? — 12. Ĉu vi kredis lin? — 13. Kial vi ne kredis lin? — 14. Kion li faris, kiam vi ne volis kredi lin? — 15. Kio igis vin deturni la kapon? — 16. Kiu faligis vin? — 17. Ĉu io doloras vin? — 18. Kio ĉagrenas vin? — 19. Kion vi faris, post kiam vi reeniris hejmen? — 20. Kion vi purigis? — 21. Kion vi bandaĝis?

#### LEXICOLOGIE

La servantino levigis min je la sepa, kaj ekbruligis la fajron por pretigi mian ĉokoladon.

La gimnastiko fortigas la lernantojn, *ou*: igas fortaj la lernantojn.

— *ig* signifie *faire* (devant un infinitif), *rendre* (devant un adjectif). Il s'emploie comme suffixe ou comme verbe. Comme suffixe, on peut l'ajouter à des substantifs, à des adjectifs, à des verbes ou à des prépositions. Ainsi: *ordo*, ordre — *ordigi*, mettre en ordre; *bela*, beau — *beligi*, embellir; *vidi*, voir — *vidigi*, faire voir; *for*, loin — *forigi*, éloigner, écarter.

**Exercices oraux ou écrits.**

## VERSION

La servantino brosas kaj purigas la vestojn. Por briligi (ou : por igi brilantaj) la ŝuojn, oni ciras kaj brosas ilin. Kiam oni pintigas krajonon, oni plimallongigas ĝin. Ĉiumatene mia patrino varmigas kaj boligas lakton kun ĉokolado por mia matenmanĝo. La instruisto plenigos la inkujon je inko. Liniigu vian paperon per la liniilo. Kiam ili alvenos en la lernejan ĉambron, la lernantoj eligos siajn librojn kaj kajerojn el la sako. La vento elradikigis tri arbojn. Mi igos enkadrigi vian portreton. Mi pasigis la hieraŭan tagon en la kamparo, sed la pluvo devigis min reeniri hejmen frue. Precizigu vian penson, se vi volas, ke mi komprenu vin. Ĉu vi kontentigis la instruiston? La kokino kunvenigas siajn idojn sub siajn flugilojn.

## THÈME

J'ai dû faire sécher mes vêtements parce qu'ils étaient humides. Lavez vos mains. L'art embellit la vie. Mon cousin a passé une semaine avec nous. Vous me faites rougir. Votre lettre m'a fait plaisir. Le jardinier aplanira ce chemin. La gymnastique assouplit les membres. La neige assourdit le bruit des pas. Quand le maître commencera le cours, il nous fera réciter nos leçons, puis il nous fera écrire un devoir et nous expliquera. Il variera les exercices pour nous rendre plus attentifs. Il encouragera les élèves laborieux. Nous apprendrons avec plaisir tout ce que le maître nous fera apprendre, car nous savons que cela agrandira nos connaissances et fortifiera notre jugement. Il sortit sa montre de sa poche. On peut faire sortir des étincelles d'un caillou. Ecartez ces jouets.

## ONZIÈME LEÇON

### Accusatif de direction.

#### Kelkaj movoj de la lernanto.

iom, *un peu* tiam, *alors*

Mi eniras en la korton de la lernejo. Mi atendas la horon kaj iom ludas en la korto. Poste mi eniras en la lernejoĉambron. Mi iras al mia seĝo. Mi metas mian paperujon sur la tablon, kaj mi sidigas min. Mi krucumas miajn brakojn, kaj mi direktas miajn okulojn al la instruisto.

La instruisto vokas mian nomon. Li diras al mi: Roberto, iru al la tabulo. Mi levas min; mi forlasas mian seĝon, kaj mi iras al la tabulo. Mi prenas la kreton. La instruisto diktas, kaj mi skribas. Mi tiam metas la kreton en la skatolon. Mi prenas la spongon, kaj mi forviŝas la tabulon. Mi remetas la spongon apud la kreton, mi turnas min, mi reiras al mia seĝo, mi metas min antaŭ mian tablon, kaj mi sidigas min sur mian seĝon. Nun mi sidas sur mia seĝo antaŭ mia tablo.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kiu eniras en la korton de la lernejo? — 2. Kion faras la lernantoj en la korto? — 3. Ĝis kiam atendas la lernantoj antaŭ la pordo? — 4. Ĝis kiam ludas la lernantoj en la korto? — 5. Sur kion sidigas sin la lernantoj? — 6. Kion ili metas sur la tablon? — 7. Al kiu ili direktas siajn okulojn? — 8. Por kio utilas (*est utile, sert*) la kreto? — 9. Kiu prenas la spongon? —

10. Por kio oni bezonas spongon? — 11. Por kio utilas la spongo? — 12. Sur kio sidas la lernanto? — 13. Kiun vokis la instruisto? — 14. Kial Roberto forlasis sian seĝon? — 15. Kiam Roberto forlasis sian seĝon? — 16. Kion Roberto forviŝis per la spongo? — 17. Kion li faris per la kreto? — 18. En kion li remetis la kreton?

## GRAMMAIRE

Mi metas la libron sur la tablon.

— Quand il y a direction vers et que la préposition ne l'indique pas suffisamment par elle-même, son complément prend l'**n** de l'accusatif. C'est ce qu'on appelle l'*accusatif de direction*.

— Le signe de l'accusatif de direction s'ajoute aussi aux adverbes de lieu (où, là, ici, etc.) et aux noms de lieux quand il y a mouvement, direction vers. Ainsi : **Kien** vi iras? *Où allez-vous?* **Mi** iras hejmen, *Je vais à la maison.* **Mi** iras Parizon, *Je vais à Paris.*

— La préposition **al** n'est jamais suivie de l'accusatif, parce qu'elle indique suffisamment par elle-même qu'il y a direction vers. Il en est de même de la préposition **ĝis**, *jusqu'à*.

## LEXICOLOGIE

**Mi eniras** en la ĉambron, kaj **mi reiras** al mia seĝo.

**En** veut dire *dans*. Il s'emploie comme préposition et comme préfixe pour former des verbes. Ainsi : iri, *aller* — eniri, *aller dans, entrer*.

**Re** est un préfixe qui a le même sens que *re* en français. Il indique le retour en arrière ou la répétition. Ainsi : veni, *venir* — reveni, *revenir*; sendi, *envoyer* — resendi, *renvoyer*.

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

Kien iras la lernantoj? Ili iras en la lernejon. Mia amiko iros en la ĝardenon de sia onklo. Mi ankaŭ iros tien, kaj ni ludos en la ĝardeno kun liaj kuzoj. Mi skribos leteron kaj mi sendos ĝin Parizon.

al mia onklo. Kiu forviŝis tion, kion la instruisto skribis sur la nigran tabulon? Kiam vi iros al via onklo? Paŭlo ne estis hodiaŭ en la lernejo; mi iros morgaŭ al li por viziti lin. La lignaĵisto forgesis sian segilon en la korto. Ni iris en la magazenon de la tranĉilfaristo.

## THÈME


Pierre a mis son crayon dans sa poche. Avez-vous remis la craie dans la boîte? Les élèves entrent dans la cour. Les élèves jouent dans la cour. Qui attendez-vous? Mettez vos livres sur la table. J'ai oublié mon crayon sur la table. Asseyez-vous sur votre banc. Venez devant ma table. Retournez sur votre chaise. Le maître lit dans la cour auprès d'un arbre. Que voyez-vous sur le tableau noir? Demain nous n'irons pas à l'école. Est-ce que vous ne voulez pas entrer avec moi dans ce magasin? Votre ami ira-t-il en Angleterre? Non, il ira en Italie. Mon camarade m'a poussé et je suis tombé dans la rue. Le petit garçon regarda par la fenêtre et tomba dans la rue. Le concierge a oublié sa cloche dans la cour. Emile a laissé son chapeau sur sa chaise. Mettez votre manteau dans la garde-robe (armoire à vêtements). Portez ces livres dans ma chambre et tous les autres chez le relieur. Louis travaille dans le jardin de son voisin. Allez dans le jardin et apportez-moi des prunes, que vous mettrez sur cette planche. Mettez ces pierres dans votre panier.

## DOUZIÈME LEÇON

### Manières de traduire « de ».

#### Mia familio.

Antaŭ ne longe, *il n'y a pas longtemps* (cf. leçon 33).



Mi havas patron kaj patrinon; ili estas miaj gepatroj, kaj mi estas ilia *ido*. Mi estas knabo; mi estas la filo de miaj gepatroj. Miaj gepatroj havas ankoraŭ aliajn idojn, du filojn kaj du filinojn. Ili estas miaj fratoj kaj fratinoj. Ni estas kvin gefratoj.

La gepatroj de mia patro vivas ankoraŭ; ili estas miaj patraj geavoj; miaj patrinaj geavoj estas ambaŭ mortintaj antaŭ ne longe, kaj ni funebras ankoraŭ. Miaj fratoj kaj mi estas la nepoj de niaj geavoj, kaj miaj fratinoj estas iliaj nepinoj.

Mia patro havas fratinon kaj fraton. Lia fratino estas mia onklino, kaj lia frato estas mia onklo. Mi estas ilia nevo, kaj miaj fratinoj estas iliaj nevinoj. Mia onklo estas mia baptopatro, kaj mia onklino estas mia baptopatrino. Mia onklino estas edzigita kun sinjoro Durand ; ŝi estas la edzino de sinjoro Durand, kaj sinjoro Durand estas ŝia edzo. Sinjoro Durand estas ankaŭ mia onklo. La infanoj de miaj geonkloj estas miaj gekuzoj.

Unu el miaj fratoj kaj unu el miaj fratinoj estas pli maljunaj ol mi, kaj estas jam edzigitaj. Mi ĉeestis ĉe ilia edziĝofesto. La edzino de mia frato estas mia bofratino. Mia bofrato mortis la lastan jaron ; ŝi estas vidvino, kaj mia onklo Durand estas la zorganto de ŝiaj infanoj. La kompatindaj idoj estos baldaŭ orfoj, ĉar ilia patrino estas tre malsana kaj povas tuj morti. La kuracisto ne havas plu esperon. Miaj onkloj, onklinoj, kuzoj, kuzinoj, prakuzoj kaj prakuzinoj estas miaj geparencoj ; ni estas parencaj.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kiu estas viaj gepatroj ? — 2. Kiu vi estas por viaj gepatroj ? — 3. Ĉu vi havas fratojn kaj fratinojn ? — 4. Kiom da infanoj havas viaj gepatroj ? — 5. Kiom da gefratoj vi estas ? — 6. Kiel vi nomas la gepatrojn de viaj gepatroj ? — 7. Ĉu vi havas ankoraŭ viajn patrinajn geavojn ? — 8. Kiu vi estas por viaj geavoj ? — 9. Ĉu vi havas onklojn kaj onklinojn ? — 10. Kiu estas via baptopatro ? — 11. Kiu estas via baptopatrino ? — 12. Kiel vi nomas la idojn de viaj geonkloj ? — 13. Ĉu vi ne havas fraton, kiu estas jam edzigita ? — 14. Kiel vi nomas lian edzinon ? — 15. Ĉu via fratino ne estas vidvino ? — 16. Kiel vi nomas la infanojn, kiuj ne havas plu nek patron nek patrinon ? — 17. Kiel vi nomas per unu sola vorto viajn onklon kaj onklinon?... viajn kuzon kaj kuzinon ?



## GRAMMAIRE .

Unu **el** miaj fratoj manĝis pecon **da** pano.

— *De* après un nom de nombre et signifiant *d'entre* se traduit par **el**. Il se traduit aussi par **el** quand il marque l'*origine*, la *provenance*, la *matière* ; mais après un nom de mesure, de poids, de quantité, il se traduit par **da**.

Dans les autres cas *de* se traduit généralement par **de**. Ainsi : Le livre de Charles, *la libro de Karolo* ; le fils du roi, *la filo de la reĝo* ; venir de Londres, *veni de Londono*, etc.

A remarquer cependant les locutions : La route de Paris, *la vojo al Parizo* ; la bataille de..., *la batalo apud...* ; nous parlions de..., *ni parolis pri...*

## LEXICOLOGIE

La patro kaj la patrino estas miaj **gepatroj**. Mi estas ilia **ido**. Mia bofrato mortis. Mi havas multe **da prakuzinoj**.

— Le suffixe **in** indique le féminin dans les substantifs. Ainsi : *La koko*, le coq ; *la kokino*, la poule ; *la bovo*, le bœuf ; *la bovino*, la vache.

— Le suffixe **id** signifie enfant et marque le descendant. Ainsi : *La kokido*, le poulet ; *la bovido*, le veau.

— Le préfixe **ge** marque l'ensemble des deux sexes. Ainsi : *La geavoj*, les grands-parents ; *la gesinjoroj X*, monsieur et madame X ; *bonan tagon gesinjoroj*, bonjour messieurs et mesdames.

— Le préfixe **bo** marque la parenté résultant du mariage et correspond à *beau*, *belle* dans les composés français. Ainsi : *La bopatro*, le beau-père ; *la bopatrino*, la belle-mère.

— Le préfixe **pra** correspond au mot *arrière* dans les composés français. Ainsi : *La praavino*, l'arrière-grand-mère.

**Exercices oraux ou écrits.**

Formez des dérivés en ajoutant aux substantifs suivants les suffixes **in** et **id** et employez-les dans de petites phrases.

1° **in**. La kuzo — La avo — La patro — La nepo  
La onklo — La nevo — La bovo — La koko —  
La hundo — La kato — La kapro — La ĉevalo.

2° id. La birdo — La bovo — La koko — La kapro — La ĉevalo — La azeno — La muso.

Remplacez les tirets par un substantif formé au moyen des préfixes suivants et employez-les dans de petites phrases :

1° ge. La frato kaj la fratino estas —. La nepo kaj la nepino estas —. La patro kaj la patrino estas —. La baptopatro kaj la baptopatrino estas —. La onklo kaj la onklino estas —. La kuzo kaj la kuzino estas —. La avo kaj la avino estas —.

2° bo. La edzo de mia fratino estas mia —. La edzino de mia frato estas mia —. La patro de via edzino estas via —. La patrino de via edzo aŭ de via edzino estas via —.

3° pra. La patro de mia avo estas mia —. La patrino de mia avino estas mia —. Mi estas la — de miaj prageavoj. La filo de mia praonklo estas mia —. La filino de mia praonklino estas mia —.

#### THÈME

Je n'ai plus ni grand-père ni grand-mère. Mes grands-parents paternels et mes grands-parents maternels sont morts. Mes parents vivent encore mais ils sont très vieux. J'ai deux frères et une sœur. Mes frères sont tous deux mariés et ma sœur est fiancée avec monsieur Miller, le fils de notre voisin. Monsieur Miller sera mon beau-frère et moi aussi je serai son beau-frère. Mes frères ont beaucoup d'enfants, des garçons et des filles. Je suis leur oncle et ma sœur est leur tante. Ils sont nos neveux et nos nièces, et nos parents les appellent leurs petits-enfants.

## TREIZIÈME LEÇON

### Les nombres.

#### Ni kalkulas.

1 unu, 2 du, 3 tri, 4 kvar, 5 kvin, 6 ses, 7 sep, 8 ok, 9 naŭ, 10 dek. Mi havas unu buŝon. Vi havas du okulojn. Du kaj unu estas tri. La tablo havas kvar piedojn. La homo havas kvin sentojn. Ni laboras dum ses tagoj. La semajno havas sep tagojn. Kvar kaj kvar aŭ *duoble* kvar estas ok. Tri kaj tri kaj ankoraŭ tri aŭ *trioble* tri estas naŭ. Mi havas dek fingrojn.

Dek objektoj estas *deko*, dekoble dek estas *cent* aŭ *cento*, centoble dek estas *mil* aŭ *milo* kaj miloble mil estas *miliono*. Por fari la nomojn de la dekoj, centoj kaj miloj oni aldonas la vortojn dek, cent, mil al la nomoj de la *unuoj*. Tiel, *dudek*, *tridek*... *kvarcent*, *kvincent*... *sesmil*, *sepmil* k. t. p. (kaj tiel plu). Por formi la aliajn nombrojn oni aldonas la nomojn de la unuoj al la nomoj de la dekoj, centoj kaj miloj. Tiel, *dek-unu*, *dek-du*... *dudek-tri*, *tridek-kvar*, *kvarcent-kvindek-ses*, *sesmil-naŭ*, *okmil-tricent-naŭdek-naŭ*. Ni estas en la jaro mil naŭcent-ok aŭ deknaŭ cent ok.

La alfabeto esperanta havas dudek literojn. **A** estas la *unua*, **B** (bo) la *dua*, **E** la *kvina*, **U** la *dudeka*, **Z** (zo) estas la *dudekdua* aŭ la lasta kaj **V** (vo) la antaŭlasta.

Unu estas la *duono* de du; tri estas la *triono* de naŭ; kvar estas la *kvarono* de sesdek; ok estas la *sepono* de kvindek-ses. La tri *kvaronoj* de dudek faras dek-kvin, kaj la tri *seponoj* de dudek-ok kun la kvar *naŭonoj* de tridek-ses faras dudek-ok.

## QUESTIONNAIRE

1. Ĉu vi havas du buŝojn? — 2. Kiom da okuloj vi havas? —
3. Kiom faras du kaj unu? — 4. Ĉu la tablo havas du aŭ tri piedojn? — 5. Kiom da sentoj havas la homo? — 6. Dum kiom da tagoj ni laboras? — 7. Kiom estas la duoblo de kvar? —
8. Kiom estas la trioblo de tri?... la dekoblo de dek?... — 9. Kiel oni formas la nomojn de la dekoj? — 10. Kiel oni formas la nombrojn inter du dekoj? — 11. En kioma jaro ni estas? —
12. Kiom da literoj havas la esperanta alfabeto? — 13. Kiu estas la tria?... la oka?... la dekdua? — 14. Kiom estas la duono de du?... la triono de tri?

## GRAMMAIRE

## La du unuaj lernantoj.

— L'adjectif numéral cardinal est invariable.

— L'adjectif numéral ordinal s'accorde comme l'adjectif qualificatif. On l'emploie pour indiquer la *date*, la *page* et le *chapitre* d'un livre, le *rang* d'un souverain. Ainsi on dit : *La trian de Julio*. — *Vidu la dekduan paĝon*. — *Ludoviko la dekkvara*.

— Les formes numériques en **aine** comme *dizaine*, *douzaine*, etc. s'obtiennent en ajoutant au nombre la caractéristique **o**.

Exemple : *dek-duo*, *cento*.

Cependant pour désigner une quantité approximative on fera précéder le nombre de *ĉirkaŭ* (environ). Ainsi : *Mi pagis ĉirkaŭ dek frankojn, j'ai payé une dizaine de francs*.

— Les nombres fractionnaires se forment au moyen du suffixe **on** et les nombres multiplicatifs au moyen du suffixe **obl**; enfin les distributifs se marquent par la préposition **po** (*à raison de*, *au taux de*) précédant le nombre. Ainsi : *La triono de la sesoblo de du estas kvar, le tiers du sextuple de deux est quatre. Tiuj persikoj kostis po dek centimoj, ces pêches ont coûté 10 centimes « par pièce. »*

**Exercices oraux ou écrits.**

Répondez aux questions suivantes :

*Unue* : Kio estas la kvinono de dudek?... la sesono de tridek-ses?... la sepono de kvardek-naŭ?... la kvin dekduono de dudek-kvar?

*Due* : Kiom faras kvardek-du kun la sesono de kvardek-du?... la okono de sesdek-kvar kun la du naŭonoj de tridek-ses kaj la dekono de tricent kvardek?

*Trie* : Kiom estas la kvin sesonoj de tridek-ses?... la sep okonoj de sesdek-kvar?... la du triono de la tri kvaronoj de dek-du?

*Kvare* : Kiom estas la *duoblo* de duono de ducent kvardek-naŭ?... *trioblo* de triono de kvardek-kvar?... *kvinoblo* de kvinono de kvincent kvindek-kvin?

*Kvine* : Mi aĉetis dekduon da persikoj, kiuj kostis al mi po dek centimoj. Kiom mi pagis por ĉio?

## THÈME

(Ecrire les nombres en toutes lettres.)

Mon camarade a acheté  $\frac{1}{4}$  de douzaine de crayons. Une boîte de plume contient 12 douzaines ou 144 plumes. C'est en l'année 1492 que Christophe Colomb a découvert le nouveau monde. Louis XIV a régné de 1643 à 1715. J'ai reçu votre lettre du 29 juillet. Ouvrez votre livre et cherchez la page 105. Nous avons lu le premier chapitre. Il a acheté 6 mètres de drap à raison de 8 francs le mètre. Combien a-t-il payé? Il a payé 48 francs. Quel est le quintuple des trois cinquièmes de 155? C'est 465.

## QUATORZIÈME LEÇON

### Accusatif de durée.

### Divido de la tempo.

Hodiaŭ estas mardo ; hieraŭ estis lundo kaj morgaŭ estos merkredo. Mardo, lundo kaj merkredo estas tagoj de la semajno. La semajno havas sep tagojn ; ili estas nomitaj : *lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato* kaj *dimanĉo*. Se ni diras, ke lundo estas la unua tago de la semajno, mardo estas la dua, merkredo la tria, vendredo la kvina, dimanĉo la sepa aŭ la lasta kaj sabato la antaŭlasta.

Kvar semajnoj faras unu monaton. La jaro havas dek-du monatojn aŭ kvindek-du semajnojn aŭ tricent sesdek-kvin tagojn. La nomoj de la monatoj estas : *januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro* kaj *decembro*.

Kelkaj monatoj havas tridek tagojn, kelkaj havas tridek-unu, kaj unu sola, la monato februaro, havas nur dudek-ok aŭ dudek-naŭ tagojn. Kiam la monato februaro havas dudek-naŭ tagojn, la jaro estas superjaro. Tio okazas ĉiukvarjare. Ni vidas la daton en la kalendaro. Se ni ne havas kalendaron, ni demandas : *Kioman daton ni havas hodiaŭ ?* Oni respondos al ni : *Hodiaŭ ni havas la dek-sesan de julio.*

Tri monatoj formas ankaŭ kvaronjaron, ses monatoj duonjaron, kaj cent jaroj estas nomitaj centjaro aŭ jarcento. Ni vivas en la dudeka jarcento.

## QUESTIONNAIRE

1. Kioman tagon ni havas hodiaŭ? — 2. Kioma tago estis hieraŭ?... antaŭhieraŭ? — 3. Kioma tago estos morgaŭ?... postmorgaŭ? — 4. Kiom da tagoj havas la semajno? — 5. Kiuj estas la nomoj de la sep tagoj de la semajno? — 6. Kiu estas la tria tago?... la kvina?... la lasta?... la antaŭlasta? — 7. Kiom da semajnoj estas en unu monato? — 8. Kiom da monatoj enhavas jaro? — 9. Kiuj estas la nomoj de la dek-du monatoj? — 10. Ĉu ĉiuj monatoj havas la saman nombron da tagoj? — 11. Kiom da tagoj havas la monato junio? — 12. Kiel oni nomas la jaron, kiam februaro havas dudek-naŭ tagojn? — 13. En kiu monato ni estas? — 14. Por kio utilas (*aŭ*: servas) la kalendaro? — 15. Kioman daton ni havas hodiaŭ? — 16. Kio estas kvaronjaro?... duonjaro? — 17. En kiu jarcento ni vivas?

## GRAMMAIRE

Mi foriros la dek-sesan de julio.

— Outre le complément direct, on met aussi à l'accusatif (sans préposition) les noms qui marquent la *date*, la *durée*, le *poids*, la *mesure*, le *prix*.

Ex. : Tio okazis la trian de Aŭgusto, *cela est arrivé le 3 Août*. Ni restos tri monatojn en (*ou*: sur) la kamparo, *nous resterons trois mois à la campagne*. Tiu tablo estas du metrojn longa, *cette table est longue de deux mètres*.

Kiom da tagoj havas la semajno?

— Le nom précédé d'une préposition se met au nominatif, c'est à dire garde la terminaison du cas sujet, excepté quand il faut indiquer qu'il y a *direction vers*. (Voir leçon 11.)

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

La trian de Aŭgusto mia frato iros (*aŭ*: veturos) en Londonon. Li restos tie ses monatojn por lerni la anglan lingvon. Mia avo naskiĝis la duan de aprilo mil-okcent-dudek-naŭ; li havos la aĝon de sepdek-sep jaroj (*aŭ*: li estos sepdeksepjara) la

duan de la proksima aprilo. Kiun aĝon vi havas (*aŭ* : kiu estas via aĝo), malgranda mia amiko? Mi havas dek-du jarojn kaj duonon (*aŭ* : mi havas la aĝon de dek-du jaroj kaj duono); mi estas malgranda laŭ mia aĝo. En kiu monato ni estas? Kiom da tagoj havas la monato julio? Se vi tion ne scias, prenu vian kalendaron, ĝi diros tion al vi. Superjaro havas tricent-sesdek-ses tagojn. Nia servantino aĉetis hieraŭ du kilogramojn da kafo po du frankoj, kaj tri funtojn da sukero po sesdek-kvin centimoj? Kiom ŝi pagis por ĉio?

## THÈME

Tous les quatre ans le mois de février a vingt-neuf jours et alors l'année est bissextile. Le jour est  $\frac{1}{7}$  de la semaine, la semaine est  $\frac{1}{4}$  du mois et le mois est  $\frac{1}{12}$  de l'année. Aujourd'hui nous sommes mercredi, c'est le troisième jour de la semaine. Le jeudi et le dimanche nous n'allons pas à l'école. Le 5 août j'irai avec mes parents au bord de la mer, nous y resterons 6 semaines ou un mois et demi. Je suis né le 1<sup>er</sup> avril 1849, disait un grand-père à son petit-fils, peux-tu me dire l'âge que j'aurai le 1<sup>er</sup> avril 1809? Mon cousin a acheté hier une demi douzaine de pêches; elles ont coûté 1 franc 20 centimes, c'est à dire 20 centimes la pêche. C'est cher, mais elles étaient belles et bonnes.

## Phrases usuelles.

Quelle est votre opinion ?	<i>Kia estas via opinio ?</i>
Qu'en pensez-vous ?	<i>Kion vi pensas pri tio ?</i>
Je le crois ; j'en suis certain.	<i>Tion mi kredas ; mi estas certa pri tio.</i>
J'en doute ; je ne sais pas.	<i>Mi dubas pri tio ; mi ne scias.</i>
Vous vous trompez.	<i>Vi eraras.</i>



## QUINZIÈME LEÇON

### Mots composés.

#### La horloĝo.

La horloĝo mezuras la tempon; ĝi diras al ni kioma horo estas.

Estas diversaj specoj de horloĝoj. Tiu, kiun ni povas meti en la poŝon estas poŝhorloĝo. Jen poŝhorloĝo kun ĝia ĉeno. La poŝhorloĝo havas ciferpлатon kun dek-du ciferoj kaj du montrilojn. La montriloj iras de maldekstre al dekstre, kaj montras la horojn kaj la minutojn. Unu horo havas sesdek minutojn; la minuto enhavas sesdek sekundojn, kaj la sekundo konsistas el momentoj.

La granda montrilo montras la minutojn, kaj la malgranda la horojn. Kiam la granda montrilo estas sur dek-du kaj la malgranda sur dek, ĝi estas *ĝuste la deka horo*. Kiam la malgranda estas inter naŭ kaj dek, kaj la granda sur ses, ĝi estas *la naŭa kaj duono*. Kiam la granda montrilo estas sur tri, kaj la malgranda sur unu, ĝi estas *la unua kaj kvarono*. Kiam la malgranda estas inter dek kaj dek-unu, kaj la granda sur naŭ, ĝi estas *la deka kaj tri kvaronoj, aŭ la kvarono antaŭ la dek-unua*. *Kioma horo estas, kiam la malgranda montrilo kuŝas sur tri, kaj la granda sur du?*

La horloĝo, kiu estas sur la kameno estas kamenthorloĝo; tiu, kiu estas alkroĉita je la muro estas murhorloĝo, kaj tiu, kiu estas en turo aŭ sonorilejo

estas sonorilejhorloĝo. Ni havas horloĝon el bronzo. Mia poŝhorloĝo estas el arĝento, sed la via estas el oro. La horloĝisto faras la horloĝojn.

Via poŝhorloĝo haltis ; streĉu ĝin. La mia ne funkcias bone ; jen ĝi trorapidas jen ĝi malrapidas. Mi devas reguligi ĝin ofte.

#### QUESTIONNAIRE

1. Per kio oni mezuras la tempon ? — 2. Kio estas poŝhorloĝo ? — 3. Kion oni vidas sur la ciferplato de la poŝhorloĝo ? — 4. Laŭ kiu direkto iras la montriloj ? — 5. Kion montras la granda montrilo ?... kaj la malgranda ? — 6. Kiom da minutoj estas en unu horo ? — 7. Kio estas sekundo ? — 8. Kioma horo estas, kiam la granda montrilo montras ses kaj la malgranda estas inter ses kaj sep ? — 9. Kioma horo estas, kiam la malgranda montrilo estas sur tri kaj la granda sur du ? — 10. Kio estas kamenhorloĝo ? — 11. Kie estas metita la murhorloĝo ? — 12. Ĉu vi havas poŝhorloĝon el oro aŭ el arĝento ? — 13. Kion oni devas fari, kiam poŝhorloĝo haltis ? — 14. Kion oni devas fari, kiam ĝi trorapidas aŭ malrapidas ? — 15. Ĉu via poŝhorloĝo funkcias bone ?

#### LEXICOLOGIE

Estas **poŝhorloĝoj**, **murhorloĝoj**, **kamenhorloĝoj** kaj **sonorilejhorloĝo**.

L'esperanto forme facilement des mots composés en accolant deux racines et en ayant soin de mettre le mot *déterminant* avant le mot *déterminé*. Ainsi, bateau à vapeur se dit *vaporŝipo* ; jour de fête, *festtago* ; jour ouvrier, *labortago*.

#### Exercices oraux ou écrits.

— Citer les mots composés que vous connaissez.

— Traduire les mots composés suivants :

Nasztuko — tablotuko — buŝtuko — (*aŭ* : telertuko) — tualettuko — viŝtuko — okulvitro — fenestrovitro — tualetmeblo — vapormaŝino — kamentubo

— skribpapero — leterpapero — poŝtmarko — gas-  
lampo — oleolampo — petrollampo — ventoŝirmilo  
— fulmŝirmilo — pomarbo — fruktovendisto —  
arbokulturisto — promenĝardeno — florgardeno  
— fruktoĝardeno — legomĝardeno — matenmanĝo  
— vespermanĝo.

## VERSION

Kie estas via poŝhorloĝo? La mia estas ĉe la horloĝisto. Mia frato pruntedonis al mi la sian, sed ĝi haltis; mi forgesis streĉi ĝin. La onklino de mia amiko aĉetis hieraŭ por li grandan, belan kamenhorloĝon el bronzo kiel edziĝodonaĉon.

## THÈME

Une seconde, dites-vous, est peu de chose (*mal-  
multo*). Mais avez-vous pensé qu'avec (*per*) les  
secondes on fait les minutes, avec les minutes les  
heures et avec les heures les jours? Souvent j'ai  
entendu dire: pourquoi me mettrai-je (*komenci*)  
encore à travailler? Dans (*post*) un quart d'heure  
nous dînerons. N'est-ce donc rien [qu']un quart  
d'heure qui ne revient pas? Mais si vous lisez  
chaque jour pendant un quart d'heure, cela fera  
sept quarts d'heure dans une semaine, trente quarts  
d'heure ou sept heures et demie dans un mois,  
quatre-vingt dix heures dans un an et neuf cents  
heures dans dix ans. Jugez (*juĝi pri*) ce qu'on  
peut lire en (*dum*) neuf cents heures.

## SEIZIÈME LEÇON

### Adverbe.

#### La partoj de la tago kaj la festoj de la jaro.

La suno leviĝas kaj subiras. Dum la suno estas ĉe la ĉielo, estas lume, kaj ni diras : estas tago. Kiam la suno malaperis el la ĉielo, kiam ĝi subiris, tiam fariĝas mallume kaj estas nokto. Dum la nokto, ni ne povas vidi la sunon, sed ni vidas la lunon kaj ofte multe da steloj.

Kiam la suno leviĝas, estas sunleviĝo kaj la mateno komenciĝas ; kiam ĝi plej alte estas kaj plej varme fariĝas, tiam estas tagmezo ; kiam la suno subiras, estas sunsubiro, kaj la vespero alvenas.

La mezo de la nokto nomiĝas noktomezo. Morgaŭ frue mi vekigōs. Dum la mateno mi laboros. Je la dek-dua horo, aŭ je la tagmezo, mi tagmanĝos ; post la tagmezo aŭ posttagmeze mi promenados ; vespere mi legos kaj nokte mi dormos. Neniam mi enlitigōs pli malfrue ol noktomezo.

Dum la jaro ni havas kelkajn grandajn festajn tagojn. Kristnasko, en la dudek-kvina tago de decembro, estas la plej bela festo por la infanoj : ili ricevas ĉiuspecajn ludilojn, kaj oni faras por ili kristnaskan arbon. Post ok tagoj, ĝi estas la nova jaro. Tio estas la tago de la bondeziroj kaj de la vizitoj. « *Ĉiujn miajn dezirojn por bona jaro!* »... « *Bonan kaj feliĉan jaron!* » estas frazoj, kiujn oni aŭdas la tutan tagon. Tio estas ankaŭ la tago de la novjaraj donacoj. En la monato marto aŭ aprilo

okazas Pasko. Kvindek tagojn post Pasko okazas la Pentekosto ; tio estas la festo de la printempo. Fine la dek-kvara tago de julio estas la Franca nacia festo.

## QUESTIONNAIRE

1. Pri kio parolas tiu ĉi leciono ? — 2. Kion ni diris pri la suno ? — 3. Kiam estas lume ? — 4. Kion ni diras por esprimi, ke estas lume ? — 5. Kio okazas, kiam la suno subiris ? — 6. Kion ni vidas dum la nokto ? — 7. Kiam komencas la mateno ? — 8. Kiam estas tagmezo ? — 9. Kiel oni nomas la parton de la tago, kiam la suno subiras ? — 10. Kiel oni nomas la mezon de la nokto ? — 11. Kion vi faras matene frue ? — 12. Kion vi faras posttagmeze ?... vespere ?... nokte ? — 13. Ĉu vi kuŝiĝas pli malfrue ol noktomezo ? — 14. Kiam okazas la Kristnaska festo ?

## GRAMMAIRE

Nokte mi dormas. Mi salutos amike miajn kamaradojn.

— L'adverbe est caractérisé par la désinence *e*, qui équivaut ordinairement à **ment** français. Ainsi : *Saĝa*, sage ; *sage*, sage-ment ; *ordinara*, ordinaire ; *ordinare*, ordinairement ; *vespero*, soir ; *vespere*, le soir, pendant la soirée ; *promeni*, se promener ; *promene*, en promenade ; *dum*, pendant ; *dume*, en attendant.

Il suffit, comme on voit, d'ajouter un *e* à une racine quelconque, pour obtenir un adverbe.

## LEXICOLOGIE

La suno leviĝas kaj la mateno komenciĝas.

— Le suffixe *iĝ* signifie *devenir*. Il s'ajoute à des substantifs, à des adjectifs, à des prépositions, à des verbes, pour former de nouveaux verbes qui correspondent ordinairement à des verbes pronominaux français. *Fortiĝi*, se fortifier ; *fianĉiĝi*, se fiancer ; *duobligi*, se doubler ; *sidiĝi*, s'asseoir (*sidi*, être assis).

— Il ne faut pas confondre les verbes en *iĝi* avec ceux en *igi*. Pour bien comprendre la différence, comparez : *fortigi*, fortifier, rendre fort ; *fortiĝi*, se fortifier, devenir fort ; *ruĝigi*, faire rougir ; *ruĝiĝi*, rougir, devenir rouge.

Posttagmeze mi promenados.

— Le suffixe **ad** indique la durée dans l'action. Ainsi : *trançi*, couper ; *trançadi*, taillader ; *pafō*, coup de fusil ; *pafado*, fusillade ; *parolo*, parole ; *parolado*, discours ; *viziti*, visiter ; *vizitadi*, fréquenter.

**Exercices oraux ou écrits.**

Formez avec les mots suivants des verbes en **iĝ** et employez-les dans de petites phrases :

Kun — edzino — pura — dika — maldika — juna — maljuna — levi — fari — kontenta — granda — malforta — nomi — trovi — riĉa — stari — sidi — scii — fini — seka — laca — verda — movi — fleksi — rompi — renversi — kovri.

THÈME

Le soleil se lève le matin et se couche le soir. La nuit nous ne pouvons pas voir le soleil ; mais nous voyons quelquefois la lune et les étoiles. Demain nous nous lèverons de bonne heure pour voir le lever du soleil. Pouvez-vous me dire à quelle heure le soleil se couche maintenant ? Quand le soleil est le plus haut et quand ses rayons sont le plus chauds il est midi. Minuit est le milieu de la nuit. Le jour nous travaillions et nous nous promenions, le soir nous lisions et la nuit nous dormions. La nuit dernière je n'ai pas pu dormir une heure. Ce soir je me coucherai aussitôt après le souper. A Pâques les élèves et les maîtres ont deux semaines de vacances. De toutes les fêtes de l'année la Pentecôte est celle que (*tiu, kiun*) je préfère. Mon frère saute très bien. Cet enfant saute toute la journée. Le chant que vous chantiez est très beau. Le chant est une occupation agréable. On s'instruit beaucoup par la lecture.

## DIX-SEPTIÈME LEÇON

### Degrés de comparaison.

#### La kvar sezonoj.]

*iom post iom, peu à peu.*

En unu jaro estas kvar sezonoj; ili estas la *printempo*, la *somero*, la *aŭtuno*, la *vintro*.

La printempo komenciĝas en marto, la somero en junio, la aŭtuno en septembro kaj la vintro en decembro.

En la komenco de la printempo la tago estas tiel longa kiel la nokto. Poste la tagoj fariĝas iom post iom pli longaj kaj la noktoj pli mallongaj, tial ke la suno leviĝas pli frue kaj subiras pli malfrue; ĝiaj radioj ekvarmigas la teron kaj vekas la naturon. Baldaŭ la arboj kovriĝas per folioj novaj kaj floroj, kaj la herbejoj kaj kampoj reverdiĝas. La birdoj konstruas siajn nestojn kaj kantas siajn gajajn kantojn.

La dudek-unua de junio estas la tago plej longa kaj la nokto plej mallonga. Tiam komenciĝas la somero. Nun la tagoj fariĝas iom post iom pli mallongaj kaj la noktoj pli longaj. La suno restas longe ĉe la ĉielo kaj ĝiaj radioj maturigas la fruktojn de la ĝardeno kaj de la kampoj. Oni sekigas la fojnon kaj oni rikoltas la grenon. La urbanoj iras por serĉi iom da malvarmeto en la montaron aŭ ĉe la marbordon, aŭ simple sur la kamparon, precipe apud la arbaroj.

La dudek-unuan de septembro la tago ree estas tiel longa kiel la nokto. Tiam komenciĝas la aŭtuno. La suno subiras pli kaj pli frue kaj leviĝas pli kaj pli malfrue. La tagoj fariĝas ree pli mallongaj kaj la noktoj pli longaj. En aŭtuno la kulturisto rikoltas la lastajn fruktojn kaj la ĉasisto ĉasas. La folioj de la arboj fariĝas flavaj kaj baldaŭ falos teren.

La dudek-unuan de decembro ni havas fine la tagon la plej mallongan kaj la nokton plej longan. Tio estas la vintro. La aero fariĝas ĉiam pli kaj pli malvarma. La kampoj kaj la herbejoj estas malplenaj kaj senhomaj; la arbaro estas nudigita kaj silenta; la tuta naturo ripozas sub neĝa kaj glacia mantelo. La vintro estas malgaja kaj peniga sezono; ĝi prezentas tamen kelkajn plezurojn: oni povas glitkuri, glitveturi, fari bulojn aŭ hometojn el neĝo, kaj tio estas tre amuza.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kiom da sezonoj estas en la jaro? — 2. Kiuj estas la nomoj de la kvar sezonoj? — 3. Kiam ili komenciĝas? — 4. Kiaj estas la tago kaj la nokto en la komenco de la printempo? — 5. Kiaj fariĝas poste la tagoj? — 6. Ĉu la noktoj ankaŭ fariĝas pli longaj? — 7. Kial la tagoj fariĝas pli longaj? — 8. Diru tion, kion vi scias ankoraŭ pri la printempo. — 9. Kiam ni havas la tagon plej longan kaj la plej mallongan nokton? — 10. Kiaj fariĝas la tagoj en somero? — 11. Parolu pri la somero. — 12. Kiam la tago estas ree tiel longa, kiel la nokto? — 13. Kial la tagoj fariĝas pli kaj plimallongaj? — 14. Diru tion, kion vi scias ankoraŭ pri la aŭtuno. — 15. Kiam komenciĝas la vintro? — 16. Kiaj estas tiam la kampoj, la herbejoj kaj la arbaroj? — 17. Ĉu la vintro estas gaja sezono? — 18. Kiuj estas tamen la plezuroj de la vintro? — 19. Kiom da monatoj daŭras ĉiu sezono?



## GRAMMAIRE

*Comparatif.* — En la komenco de la printempo la tago estas **tiel** longa **kiel** la nokto. En somero la tago estas **pli** longa **ol** la nokto, kaj la nokto estas **malpli** longa **ol** la tago.

— Le comparatif d'égalité se forme en traduisant *aussi... que* par **tiel... kiel**. Ex. : **Tiel** riĉa **kiel**... *Aussi riche que...*

— Le comparatif de supériorité se forme en traduisant *plus... que* par **pli... ol**. Ex. : **Pli** granda **ol**... *Plus grand que...*

— Le comparatif d'infériorité se forme en traduisant *moins... que* par **malpli... ol**. Ex. : **Malpli** maljuna **ol**... *Moins âgé que...*

*Superlatif.* — La dudek-unua de junio estas la tago **plej** longa kaj la nokto **plej** mallonga.

— Le superlatif relatif se forme en traduisant *le plus* par **plej** (*ou : la plej*) et *le moins* par **malplej** (*ou : la malplej*).

Ex. : Le plus riche, *la plej riĉa* ; le moins heureux, *la malplej feliĉa*.

## LEXICOLOGIE

Multaj urbanoj pasigas la someron sur la kamparo apud la arbaroj aŭ en la montaro.

— *Kamparo*, *arbaro* et *montaro* sont formés de *kampo*, champ ; *arbo*, arbre ; *monto*, mont et du suffixe **ar** qui exprime la réunion, la collection, le groupe. Ainsi : *Vortaro*, dictionnaire ; *demandaro*, questionnaire ; *manĝilaro*, le couvert (de table) ; *juĝantaro*, la magistrature ; *gazetaro*, la presse ; *ŝtuparo*, escalier.

**Exercices oraux ou écrits.**

— Mettez au comparatif d'égalité puis au comparatif de supériorité et employez dans de petites phrases :

Granda — bela — alta — nova — maljuna —  
atenta — ĝentila — mallonga — maldika — zorg-

ema — ordema — nigra — largâ — dika — mal-seka — longa — mallargâ.

— Mettez au comparatif d'infériorité puis au superlatif et employez dans de petites phrases :

Malgranda — malalta — malbela — feliça — mal-feliça — senzorgema — senordema — varma — malvarma — bona — riça — malriça — malbona — kara — pinta — utila.

#### THÈME

En été les jours sont plus longs qu'en hiver parce que le soleil se lève plus tôt et se couche plus tard. Notre voisin est très riche ; il est plus riche que votre oncle. Aujourd'hui je me suis levé plus tôt que mon frère et je me coucherai plus tard que lui. Ce livre est plus beau mais moins intéressant que celui de Paul. Louise est plus jeune et plus petite que Louis, mais elle est plus studieuse que lui. Je suis aussi âgé et aussi grand que mon cousin Charles. N'avez-vous pas autant de livres que votre camarade ? Cet élève a autant de cahiers et de livres que son voisin. Les élèves les plus studieux font le plus de progrès. [C'est] en hiver [que] nous avons les jours les moins longs. Une charpente consiste en (*el*) poutres, comme un squelette consiste en os. Ce serrurier a perdu sa clientèle par (*pro*) sa négligence. Un groupe d'abeilles s'appelle un essaim, un groupe de fourmis une fourmilière, un groupe de chiens une meute, un groupe de bestiaux un troupeau. A quelle heure part le train (*wagon, vagono*) pour (*al*) Paris ? Une série de questions forme un questionnaire.

## DIX-HUITIÈME LEÇON

### Verbe impersonnel.

#### La vetero.

La vetero ne estas ĉiam sama ; ĝi ŝanĝiĝas laŭ la sezono kaj la klimato. En la mezeŭropaj landoj la vetero estas milda kaj varmeta dum la printempo. La ĉielo estas serena, la suno brilas en la ĉielo. kaj ĝiaj radioj varmigas la teron. Ofte ankaŭ estas vento kaj pluvas. Tiam oni diras, ke la vetero estas pluvema. La prujnojn oni devas ankoraŭ timi.

En la somero, ĝi estas varma, kelkafoje tre varma kaj eĉ varmega ; pluvas malofte kaj la tero estas seka. Kelkafoje la aero estas peza, la suno vualigās, kaj la ĉielo kovriĝas per dikaj nuboj. Fulmoj trairas la nubojn, kaj ni aŭdas la tondron ; ĝi estas fulmotondro. Baldaŭ la pluvo falas torente, ofte akompanata de hajlo. Se tiam la vento ekblovas ventege, tio estas ekventego.

En aŭtuno, la vetero fariĝas malvarmeta, la aero estas malseka kaj nebula. Dikaj nebuloj kovras la teron. La vento estas malagrabra kaj maldolĉa. Ĉirkaŭ la fino de la aŭtuno, oni vidas la arbojn kovritajn de prujno.

Vintre la ĉielo estas griza kaj oni vidas malofte la sunon. Neĝas kaj hajlas. La neĝo falas per dikaj flokoj kaj vestas la teron per blanka mantelo. La glacio kovras la lagetojn, la riveretojn kaj la riverojn. Se la tero frostiĝas, kaj se poste pluvas, la pluva

akvo glaciigas kaj kovras la teron per pluvglacio. Tiam estas glitvetero.

La vetero estas malkonstanta kaj ŝanĝema, ĝi estas bela aŭ malbela, seka aŭ malseka, varma aŭ malvarma, varmeta aŭ malvarmeta, varmega aŭ malvarmega. La barometro montras la ŝanĝojn de la vetero, kaj la termometro la ŝanĝojn de la temperaturo; ĝi montras ankaŭ la varmgradon kaj la malvarmgradon.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kia vetero estas hodiaŭ? — 2. Ĉu la vetero estas ĉiam sama? — 3. Kia estas la printempo? — 4. Ĉu estas varme aŭ malvarme dum la printempo? — 5. Ĉu pluvas? Ĉu la vetero estas pluvema? — 6. Ĉu ventas? (*aŭ* : ĉu estas vento?) — 7. Ĉu estas nuboj ĉe la ĉielo, aŭ ĉu la ĉielo estas serena? — 8. Kion oni vidas kaj kion oni aŭdas, kiam estas fulmotondro? — 9. Kiam estas nebuloj? — 10. Ĉu la vetero estas varma ĉirkaŭ la fino de la aŭtuno? — 11. Kio kovras kelkfoje la arbojn ĉe la fino de la aŭtuno? — 12. Kia estas la ĉielo dum vintro? — 13. Kio falas kaj kovras la teron? — 14. Ĉu ne estas kelkfoje pluvglacio? — 15. Por kio utilas (*aŭ* : servas) la barometro?... kaj la termometro?

#### GRAMMAIRE

Pluvas, neĝas kaj hajlas kune.

— Les verbes impersonnels ne prennent pas de sujet et le participe passé prend la forme adverbiale.

Ex. : Estas pluvinte, *il a plu*.

— La locution impersonnelle *il faut* se traduit par *estas necese*, *estas bezone* : *bezonas*, *necesas*.

#### LEXICOLOGIE

Se la vento **ek**blovas ventege, tio estas ekventego. Ĉu la vetero estas varmeta aŭ malvarmeta?

— Le préfixe **ek**, à l'opposé du suffixe **ad**, marque une action qui commence ou qui est momentanée.

Ex. : *Ekblovi*, commencer, se mettre à souffler ; *ekkrii*, s'écrier.

— Le suffixe *eg* est un augmentatif. *Et*, au contraire, est un diminutif.

Ex. : *Pluvo*, pluie ; *pluvego*, averse ; *bastono*, bâton ; *bastonego*, gourdin ; *ĉambreto*, chambrette ; *knabeto*, garçonnet.

## VERSION

Mi eklernis esperanton. La arboj ekverdiĝas. Ni ekvidis niajn amikojn. La neĝo ekfalas per floketoj. La soldatoj ekdormis, sed la bruego de la paflego (*aŭ* : de la kanono) ekvekis ilin. Pluvetas. Pluegas. Paŭlo ekploregis kaj Petro ekridegis. Ni vidis belagan palacon en la urbeto. Ni faris festeneton sur la ŝtonego apud arbeto. La ĉielo fariĝis ruĝeta. La patrino ekridetis al sia infano. La trunketoj de la herbo estas jam sekaj. La infaneto havas piedetojn kaj manetojn, la leono havas buŝegon kaj piedegojn, kaj ungegojn. Riveretoj fluas al riveroj.

## THÈME

Le vent a soufflé toute la nuit et je n'ai presque pas pu dormir. Ce matin il soufflait encore un peu et maintenant il ne souffle plus du tout. Le ciel était serein et le soleil brillait ; vers trois heures des nuages noirs cachaient le soleil ; de nombreux éclairs traversèrent les nuages et on entendit le tonnerre. Bientôt la pluie tomba à torrents. Il a plu pendant deux heures ; heureusement il n'a pas grêlé. Le printemps a été cette année très humide. Le temps était très variable à la fin de l'automne : la pluie, la neige et le vent se succédaient. Si le froid dure encore un ou deux jours on pourra patiner. Hier il a fait beau et chaud ; aujourd'hui il fait mauvais et froid. Quel temps fera-t-il demain ? Le temps est incertain, il faut emporter un parapluie.

## DIX-NEUVIÈME LEÇON

### Prépositions : per, por, pro, pri.

#### La suno kaj la vento.

La aŭtuno estis alveninta, kaj la malvarmo komenciĝis. La suno kaj la vento, kiuj konkuris *pri* la supereco, ekvidis rajdanton preterirantan, kovritan *per* granda kaj dika mantelo. « Tiu homo, diris la vento, kredas, ke li havas nenion *por* timi de mi; li forgesas, ke en momento mi povas forŝiri lian mantelon de liaj ŝultroj. »

— « Tio estus amuza vidaĵo por mi, respondis la suno, provu; sed mi vetas, ke vi ne sukcesos, kaj ke mi devigos la vojaĝanton demeti sian mantelon. Faru vi tion, kion vi povas, dum mi restos kaŝita post la nuboj. » Tuj la vento blovas, blovegas, elradikigas la arbojn, forŝiras la tegmentojn de la domoj, dronigas la ŝipojn : ĉio tio *pro* mantelo. Sed li perdas vane sian tempon; la rajdanto envolvigas sin tiel forte en sia varma vesto, ke li kontraŭstaras al la furioza vento.

Tiam la suno reaperas, ĝi dispelas la nubojn kaj alĵetas [siajn radiojn sur la teron. La vojaĝanto malfermas unue la mantelon, poste, ĉar la varmo pligrandiĝas, li lasas ĝin gliti de siaj ŝultroj, kaj fine bukligas ĝin sur la ĉevalon.

Ofte oni ricevas pli per mildeco ol per violenco.

## QUESTIONNAIRE

1. Pri kio estis temo en tiu ĉi leciono? — 2. Kion faris la suno kaj la vento? — 3. Kion ili ekvidis? — 4. Per kio estis kovrita la rajdanto? — 5. Kion diris la vento, vidante tiun viron? — 6. Kion respondis la suno al la vento? — 7. Kie la suno restis kaŝita? — 8. Kion faras tiam la vento? — 9. Diru ĝiajn penadojn. — 10. Kial li faris ĉion tion? — 11. Ĉu ĝi ne perdis sian tempon? — 12. Kion faras tiam la rajdanto. — 13. Ĉu li kontraŭstaras al la furioza vento? — 14. Kion faras la suno, kiam ĝi reaperas? — 15. Kion faras tiam la rajdanto per sia mantelo? — 16. Kio estas la morala instruo de tiu leciono?

## GRAMMAIRE

La rajdanto estis kovrita **per** granda mantelo.

— La préposition **per** indique l'instrument, le moyen, avec lequel on fait quelque chose. Elle se traduit par : *avec, par, de, au moyen de.*

— Tio estus amuza **por** mi.

— **Por** indique l'intention, le but. Il se traduit par : *pour, dans l'intention de, en vue de.* Il peut se placer devant un infinitif, comme **pour** en français.

— La vojaĝanto demetis sian mantelon **pro** la varmo.

— **Pro** indique la cause, le motif. Il se traduit par : *pour, à cause de, de.*

— En tiu ĉi leciono estas temo **pri** la suno kaj la vento.

— **Pri** veut dire : *au sujet de.* Il se traduit souvent par : *de, sur, pour.*

## LEXICOLOGIE

La suno kaj la vento konkuris **pri** la supereco.

— Le suffixe **ec** marque la qualité et sert à former des noms abstraits.

Ex. : *Infaneco*, enfance ; *juneco*, jeunesse ; *beleco*, beauté ; *boneco*, bonté ; *dolĉeco*, douceur ; *sagĉeco*, sagesse.

**Exercices oraux ou écrits.**

Formez des substantifs abstraits en ajoutant le suffixe *ec* aux mots suivants, et employez-les dans de petites phrases :

Maljuna — varma — malvarma — kara — blanka — longa — largâ — alta — bona — utila — necesa — ĝentila — justa — oportuna — saĝa — trankvila — sana — pura — firma — gaja — kontenta — libera — proksima.

## THÈME

On peut écrire avec un crayon ou avec de l'encre et une plume. Je ferai les lignes à l'encre rouge. Le menuisier scie le bois avec une scie. La couturière coud avec une aiguille et du fil. Ma chambre est éclairée par une lampe électrique. Leur sœur était vêtue d'une robe noire. J'ai vu cela de mes propres yeux. J'ai acheté un livre pour mon frère. Voici la clé pour la nouvelle serrure. Donnez-moi ce dont on a besoin pour écrire. Pour progresser, les élèves ont besoin d'attention.

Mon ami n'est pas venu à cause de la pluie. Le chien s'enfuit de peur. Nous [n']avons pu rien voir à cause de l'obscurité. Paul a été puni à cause de son bavardage. Je vous remercie de votre beau cadeau. Mon oncle m'a parlé de mes parents et de son voyage. Dans la maison d'un pendu ne parlez pas de corde. Le maître m'a interrogé sur la conjugaison. Mon oncle enseigne lui-même l'esperanto à ses fils et filles. Mon cousin m'a informé de l'arrivée de nos grands-parents. Le savon n'a pas de blancheur par lui-même et cependant il blanchit. Les petits présents entretiennent l'amitié. L'oisiveté est la mère de tous les vices. Si la jeunesse s'amuse, la vieillesse a faim. Je ne connaissais pas la profondeur de la rivière.

---



## VINGTIÈME LEÇON

### Manière de traduire : à.

#### La domo.

Unue la homoj loĝis en kavernoj; poste ili konstruis kajutojn; nun ili loĝas en domoj, kasteloj aŭ palacoj.

Mia onklo ĵus konstruis modernan domon. Ĝi havas teretaĝon kaj ses etaĝojn kun mansardoj kaj subtegmenta loko. Jen ĝi estas. Se vi deziras, ni tuj vizitos ĝin. La enirejo estas larĝa kaj bela; dekstre kaj maldekstre estas du magazenoj kun grandaj montraĵ fenestroj. Ili ne estas ankoraŭ luitaj. Tie ĉi estas la pordo de la kelo, kie oni konservas la vinon, la karbon kaj aliajn provizojn. Kontraŭe, vi vidas la loĝion de la pordisto, kaj la lifton, per kiu oni povas supreniri ĝis la sesa etaĝo. Tie estas la ŝtuparo kun ĝia balustrado el forĝita fero. Ĉu ĝi ne estas bela ŝtuparo? Ni supreniru al la unua etaĝo. Jen ni alvenas sur la placeto. Vi vidas du pordojn, unu dekstre kaj unu maldekstre, tial ke estas du loĝejoj. Ĉiuj loĝejoj estas luitaj. Mia patro luis tiun ĉi, ĉar ni devas transloĝi. Ni ekloĝos la dekkvinan de julio. Mia patro pagos luprezon da dumil okcent frankoj.

Eniru ni tien. La antaŭĉambro ne estas tre granda, sed ĝi estas tre bela, kaj oni tion ne trovas ĉie. La aliaj ĉambroj estas vastaj kaj altaj. Ili estas sep: salono, manĝoĉambro, du dormoĉambroj, skribejo

por mia patro, banejo kaj kuirejo. Estas akvo kaj gaso en la kuirejo kaj elektro en ĉiuj ĉambroj, kiujn hejtas la vaporo.

Ĉu vi vin demandis, kiom da diversaj laboristoj oni bezonas por konstrui domon? Ne, ĉu ne vere? Nu, mi tuj diros ĝin al vi, ĉar mi sekvis la konstruadon dum la tuta daŭro kun multe da atento.

Lerta arĥitekturisto desegnis la planon de la domo. La masonisto konstruis la murojn per ŝtonoj, brikoj kaj mortero, kiun li faris mem el kalko, sablo kaj akvo. La muroj estas ja vertikalaj kaj kuŝas sur fundamentoj firmaj kaj profundaj. La ĉarpentisto starigis unue trabaĵon; poste li lokis la trabojn de la plafonoj kaj la ĉarponenton de la tegmento, kiun la tegmentisto tegis per ardezaj teguloj. La defluilo kaj la akvotuboj kaj gastuboj estis metitaj de la plumbisto. La lignaĵisto faris la pordojn, la fenestrojn, la fenestrajn kovrilojn, la plankojn kaj la ŝtuparon. La seruristo almetis la serurojn, la riglilojn, kaj la balustradon de la ŝtuparo, kaj la vitraĵisto algluigis la vitraĵojn de la fenestroj. La pentristo pentris la plafonojn kaj la kuirejon, la pordojn kaj la fenestrojn, kaj la tapetisto tapetis la murojn per kolorigitaj paperoj. Fine la elektristo aranĝis la elektron; ĝi estas tre oportuna; oni bezonas nur turni butonon por havi lumon. Ankaŭ la elektristo aranĝis la telefonon.

#### QUESTIONNAIRE

[1. Kie loĝis unue la homoj? — 2. Kie ili loĝis poste? — 3. Kie ili loĝas nun? — 4. Parolu pri la domo, kiun via onklo ĵus konstruis? — 5. Kia estas la enirejo? — 6. Kio estas dekstre kaj maldekstre? — 7. Ĉu tiuj magazenoj estas jam luitaj? — 8. Kion

oni konservas en la kelo ? — 9. Ĉu estas lifto en la domo ? — 10. Kiom da loĝejoj estas sur ĉiu etaĝo ? — 11. Kiam vi ekloĝos ? 12. Kiuj estas la diversaj ĉambroj de via loĝejo ? — 13. Kiuj estas la diversaj laboristoj, kiujn oni bezonas por konstrui domon ? — 14. Kion faras la arĥitekturisto ?... la masonisto ?... la ĉarpentisto ? — 15. Kiu faras la pordojn kaj fenestrojn ? — 16. Ĉu la seruristo faras nur serurojn ? — 17. Kion faras la pentristo kaj la tapetisto ? — 18. Kiu aranĝas la akvotubojn kaj gastubojn ? — 19. Kion faras la elektristo ?

## GRAMMAIRE

Mi iris **al** la urbo ; mia amiko atendis min **ĉe** la pordo, kaj **je** la oka ni iris kune **en** la teatron.

*A* se traduit par **al** dans le sens de *vers*, par **ĉe** dans le sens de *auprès de*, par **en** dans le sens de *dans* et par **je** pour marquer l'heure.

A remarquer cependant les locutions suivantes : N'avoir rien à manger, *havi nenion por manĝi* ; boire à la source, *trinki el la fonto* ; à la campagne, *sur la kamparo* ; à demain, *ĝis morgaŭ* ; au revoir, *ĝis la revido*.

## LEXICOLOGIE

Jen estas la enirejo de la loĝejo.

— Le suffixe **ej** marque le lieu où l'on fait quelque chose.

Ex. : *La lernejo*, l'école ; *la vendejo*, le marché ; *la sonorilejo*, le clocher ; *la soldatejo*, la caserne.

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

La domo en kiu oni lernas, estas lernejo. La loĝejo estas la loko, kie oni loĝas. La enirejo estas la loko, tra kiu oni eniras. En la bierfarejo oni faras bieron ; en la biervendejo, oni vendas bieron.

Oni flegas la malsanulojn en la malsanulejoj. Mia patrino havas multajn kokinojn en sia kokejo. Bonvolu montri al mi la necesejon. Oni konservas la vestojn en la vestotenejo, kaj la veturilojn en la veturilejo. Promenejo ne estas la sama afero, kiel promenado. En la varmejo oni kulturas palmojn kaj aliajn sudajn kreskaĵojn. Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo.

## THÈME

La maison dans laquelle on prie est une église. Le cuisinier est assis dans la cuisine. La maison de mes grands-parents n'est ni un château ni une hutte. C'est une maison modeste à deux étages et très bien distribuée. Au (*sur*) rez-de-chaussée il y a le salon, le petit salon, la salle-à-manger et une grande cuisine. Un escalier en pierre conduit à la cave où mes grands-parents conservent leur vin et leur charbon. On monte aux étages supérieurs par un large escalier en bois. Au (*sur*) premier étage il n'y a que deux chambres à coucher avec des cabinets de toilette, une salle de bain et le cabinet de travail de mon grand-père. Au deuxième étage il y a quatre chambres à coucher pour mes parents, mes frères et sœurs et moi. Toutes les chambres de la maison de mes grands-parents ont de grandes fenêtres et sont vastes et hautes. Sous le toit il y a quatre petites chambres pour les domestiques.

— Faites la description de votre appartement.

---

## VINGT-ET-UNIÈME LEÇON

### Revision des prépositions.

#### Mia ĉambro.

Mia ĉambro ne estas tre granda, sed ĝi estas tre beleta kaj agrabla. Ĝi havas kvar metrojn da longeco, tri metrojn da larĝeco kaj tiom da alteco. Bela papero helrozkolora kovras la murojn, kaj la fenestro rigardas la ĝardenon de la najbaro.

Maldekstre de la pordo, en la angulo, troviĝas la lito, en kiu mi dormas ĉiam bone. Antaŭ la lito troviĝas sur la planko, kiel piedtapiŝo, bela ŝakalfelo. Flanke de la lito troviĝas la noktotablo, sur kiun mi metas mian lampon kaj mian vekhorloĝon, kaj la tualettablo, antaŭ kiu mi faras mian tualeton. Super la tualettablo estas kroĉita malgranda spegulo. Kontraŭe de la lito estas la fenestro, tra kiu la suno alkrias al mi matene frue: « tempo estas por leviĝi! »

Flanke de la fenestro troviĝas maldekstre ŝranko, en kiun mi pendigas la vestojn, kaj dekstre tablo, sur kiu mi laboras vespere kaj matene. Super la tablo estas kroĉita librobreto, sur kiu staras miaj libroj. Ne estas kameno en mia ĉambro, sed en angulo estas malgranda forno el fajenco, kiu hejtas mian loĝejon en vintro. Ĉe la muroj estas kroĉitaj la portretoj de miaj gepatroj kaj karto de Francujo, kiun mia baptopatro donacis al mi por la lasta datreveno de mia naskotago.

## QUESTIONNAIRE

1. Kia estas via ĉambro ? — 2. Kiom longa ĝi estas ? (*aŭ* : kiom da longeco ĝi havas ?) — 3. Kiom da larĝeco kaj da alteco ĝi havas ? — 4. Kia papero kovras la murojn ? — 5. Kien rigardas la fenestro ? — 6. Kio estas en via ĉambro ? — 7. Kie estas via lito ? — 8. Kio estas antaŭ via lito ? — 9. Kio troviĝas apud via lito ? — 10. Kion vi metas sur la noktotablon ? — 11. Kion vi faras antaŭ via tualettablo ? — 12. Kie troviĝas via spegulo ? — 13. Kio estas kontraŭe de via lito ? — 14. Kio estas dekstre kaj maldekstre de la fenestro ? — 15. Kio estas kroĉita super la tablo ? — 16. Ĉu estas kameno aŭ forno en via ĉambro ? — 17. Por kio utilas (servas) tiu forno ? — 18. Kiuj estas la portretoj kroĉitaj ĉe la muro ? — 19. Kiu donacis al vi karton de Francujo ? — 20. Pro kia okazo via baptopatro donacis al vi tiun karton ?

## GRAMMAIRE

*Prépositions.* — Les principales prépositions sont : **al**, à, vers ; **apud**, à côté de, près de, auprès de ; **antaŭ**, avant, devant ; **anstataŭ**, au lieu de ; **ĉe**, chez, à ; **ĉirkaŭ**, autour de, environ ; **da**, de (après un mot exprimant une quantité, une mesure, un poids) ; **de**, de, par, depuis ; **dum**, pendant ; **ekster**, hors de ; **el**, de (sortie, origine, matière) ; **en**, en, à, dans ; **ĝis**, jusqu'à ; **kontraŭ**, contre, en face de ; **krom**, hormis ; **kun**, avec ; **laŭ**, selon, d'après ; **malgraŭ**, malgré ; **per**, par, au moyen de ; **por**, pour, en vue de ; **post**, après, derrière ; **preter**, outre ; **pri**, de, au sujet de, quant à ; **pro**, pour, à cause de ; **po**, à raison de, au taux de ; **sen**, sans ; **sub**, sous ; **super**, au-dessus de ; **sur**, sur (dessus) ; **tra**, à travers, par ; **trans**, au delà de ; **je**, à, pour indiquer l'heure. (Voir p. 9).

## VERSION

La lernantoj ne iris hieraŭ en la lernejon, ili iris en (*sur*) la kamparon kun ilia instruisto, sed sen libroj kaj kajeroj. Anstataŭ libroj estis manĝaĵoj en iliaj sakoĵ. Ili promenis kaj ludis dum la tuta tago, de la sepa matene ĝis la oka vespere. Ĉiuj ĉeestis, krom Paŭlo, kiu ne povis veni pro la malsano de sia patrino. Krom la lernantoj kaj la instruisto estis ankaŭ servanto por okazo de bezono. La servanto marŝis antaŭ la lernantoj kaj la instruisto post ili. Ili iris unue tra la herbejo kaj alvenis al la malnova ponto, per kiu ili iris trans la rivero ĝis la arbaro. Ili ne marŝis laŭ vicoj sed kuris laŭ sia plaĉo. Ili haltis por la tagmanĝo apud fonto, kiu eliras el la tero sub densa foliaro. Malgraŭ la varmo tie estis malvarmete kaj agrable. Ili sidiĝis ĉirkaŭ la fonto, elmetis la provizojn el la sakoĵ kaj manĝis kun granda apetito. Super la fonto staras vasta ŝtonego, de kiu oni ĝuas belegan vidaĵon. La lernantoj grimpis sur la ŝtonegon por ĝui la vidaĵon. Ĉirkaŭ la kvara horo, oni reiris. Kiam oni alvenis ekster la arbaro, oni aĉetis ĉe vilaĝano dek litrojn da lakto po dudek centimoj. La tago pasiĝis sen pluvo kaj sen ia malfeliĉeto kaj ĉiuj reeniris ĉe la gepatrojn je la oka.

## THÈME

Les élèves mettent leurs livres sur la table. Le cahier de Charles est tombé sous le banc. En été il fait plus chaud qu'en automne. Y a-t-il encore assez d'encre dans votre encrier? Mettez cette chaise devant la table. Le printemps vient avant l'été. J'ai écrit hier à mon cousin. Il alla à la fenêtre et regarda dans la cour. Sur la cheminée

vous voyez une pendule en bronze. Au-dessus de ma table de travail est accroché un calendrier. Pendant le jour nous travaillons et pendant la nuit nous dormons. Prenez un morceau de craie et écrivez au tableau. La maison de mon oncle a coûté environ 60.000 francs. Nous restons à la maison jusqu'à 6 heures. En face de notre maison il y a un beau château. J'ai acheté deux douzaines de plumes à raison de 10 centimes les trois. Je vais avec mes parents au bord de la mer. Nous sortions tous les jours malgré le mauvais temps. Après l'automne vient l'hiver. On ne peut pas écrire sans plume ou crayon. Le vent soufflait à travers les portes de la maison. On a besoin d'eau pour se laver. On parla de vous et de votre chère famille qui demeure au-delà de la montagne. Outre le salon et la salle à manger il y a un grand cabinet de travail au rez-de-chaussée de notre maison.

#### Phrases usuelles.

Où allez-vous ?	<i>Kien vi iras ?</i>
Que désirez-vous ?	<i>Kion vi deziras ?</i>
Combien coûte ce livre ?	<i>Kiom kostas tiu ĉi libro ?</i>
Quel est votre nom ?	<i>Kia estas via nomo ?</i>
Comment vous appelez-vous ?	<i>Kiel vi nomiĝas ?</i>
Êtes-vous membre de notre groupe ?	<i>Ĉu vi estas ano de nia grupo ?</i>
Connaissez-vous ce monsieur ?	<i>Ĉu vi konas tiun sinjoron ?</i>
M. B. est-il arrivé ?	<i>Ĉu S-ro B. alvenis ?</i>
Je suis enchanté d'avoir fait votre connaissance.	<i>Mi ĝojas, ke mi konatiĝis kun vi.</i>



## VINGT-DEUXIÈME LEÇON

### Le participe passif.

#### La homo kaj la homa korpo.

La instruisto estas viro, la lernanto estas knabo; la instruistino estas virino, la lernantino estas knabino. La viro, la knabo, la virino kaj la knabino, la fraŭlo kaj la fraŭlino estas homoj.

La korpo de la homo estas kovrita per haŭto. Sub la haŭto estas la karno, la muskoloj, la nervoj kaj la ostoj. La korpo konsistas el tri partoj: la kapo, la trunko kaj la membroj.

La kapo enhavas la kranion kaj la vizaĝon. La kranio, tio estas la posta kaj la supra parto de la kapo, estas osta kestó, kiu enhavas kaj ŝirmas la cerbon; ĝi estas kovrita per haroj brunaj, blondaj, nigraj, kaŝtankoloraj, flavruĝaj aŭ blankaj.

La vizaĝo enhavas la frunton, la okulojn, la nazon, la orelojn, la vangojn, la buŝon kaj la mentonon. La nazo estas super la buŝo; ĝi estas rekta, pinta aŭ kurba; ĝi havas du naztruojn, kaj la buŝo havas du lipojn, unu supran lipon, kaj unu malsupran lipon. La knaboj kaj la viroj havas barbon je la mentono kaj lipharojn sub la nazo. Super la okulo estas la brovoj, kiuj protektas ĝin. La okulo estas ankaŭ protektata de la okulharoj. La okulo havas la formon ovalan, tio estas formo de ovo. Ĝi prezentas parton blankan, la okulajn blankaĵon, kaj rondon brunan, grizan, verdan aŭ bluan; tio estas la iriso. En la mezo estas nigra punkto: la pupilo.

En la buŝo troviĝas la dentoj kaj la lango. La supro de la buŝo estas la palato kaj en la fundo estas la palata vualo kaj la gorgo.

#### QUESTIONNAIRE

1. Pri kio estas la temo de tiu ĉi leciono? — 2. Kio estas homo? — 3. Kia diferenco estas inter la viro kaj la virino? — 4. De kio la korpo estas tegita? — 5. Kio estas sub la haŭto? — 6. Kie estas lokita la kranio? — 7. De kia koloro povas esti la haroj? — 8. Nomu la diversajn partojn de la vizaĝo. — 9. Por kio utilas aŭ servas la buŝo kaj la nazo? — 10. Ĉu vi havas barbon kaj lipharojn? — 11. Diru kion vi scias pri la okuloj. — 12. Kie troviĝas la dentoj kaj la lango? — 13. Kio estas la palato? — 14. Kio estas en la fundo de la buŝo? — 15. Kion vi faras per la dentoj?

#### GRAMMAIRE

La kapo estas **kovrita** per haroj. La okulo estas **protektata** de la brovoj.

*Estas kovrita* et *estas protektata* sont des formes passives ; l'action exprimée par les verbes *kovri* et *protekti* est supportée par le sujet.

— La forme passive du verbe s'obtient en ajoutant au verbe être — seul auxiliaire en esperanto — le participe passif.

— Le participe passif se termine en **ita**, pour marquer un *fait accompli* et en **ata**, pour marquer que le fait est *en train de s'accomplir, de devenir accompli*.

Ex. : La pordo estas fermita. *La porte est fermée (elle l'est).*  
Je la deka horo la pordo estas fermata. *A dix heures la porte est fermée (on la ferme).*

— Le participe passif s'accorde avec le sujet tout comme un adjectif.

Ex. : La okuloj estas protektataj de la brovoj.

— *Par* et *de* après un verbe passif se traduisent par **de** ou **per** selon qu'on veut désigner l'auteur de l'action ou l'instrument, à manière.

Ex. : Li estas estimata de siaj amikoj. *Il est estimé de ses amis.* — La tegmento estis kovrita de la tegmentisto per tegoloj. *Le toit a été couvert de tuiles par le couvreur.*

## VERSION

Multaj maljunaj arboj estis rompitaĵoj de la ventego. Tiu domo estas konstruata de mia onklo. En Germanujo la domoj estas ofte konstruitaj per (ou : el) brikoj. Abelo estis mortigita de sia frato Kajeno. Romo estis fondita de Romulo. Dario estis venkita de Aleksandro. Mia ĉambro estas ornamita per pentraĵoj. La korbo estis plenigita de la ĝardenisto per fruktoj. La tero, dum la vintro, estas kovrita de neĝo. La suno subiris kaj la ĉielo estis kiel superverŝita per fandita oro. Tiu sinjoro estas konata de neniu el ni. La lago estas ĉirkaŭita de kanoj. La ĝardeno estis ĉirkaŭita de la posedanto per alta muro. Nia korpo estas protektata kontraŭ la malvarmo per niaj vestoj. La tero estas varmigita de la suno. Morgaŭ estos festata la nacia festo kaj la stratoj estos ornamitaj per flagoj.

## THÈME

La leçon est expliquée par le maître et apprise par l'élève. Le devoir est fait par l'élève et corrigé par le maître. Cette maison a été construite par mon oncle. Elle est couverte de tuiles et éclairée par l'électricité. Toute ma famille sera réunie demain ; nous célébrerons l'anniversaire de naissance de mon grand-père. Trois nouveaux élèves ont été inscrits par le maître. Aimez les autres et vous serez aimé d'eux. N'avez-vous pas été invité par votre voisin ? Si le devoir de Paul n'est pas fait et si sa leçon n'est pas sue, il sera puni par son professeur et par ses parents. Les orages sont annoncés par le baromètre. En hiver la terre est couverte d'un manteau de neige. Tous ces livres m'ont été donnés par mon parrain. L'Amérique fut découverte par Christophe Colomb.

## VINGT-TROISIÈME LEÇON

**Aller, venir de — soit, tantôt, ni.**

### **La trunko kaj la membroj.**

La trunko de mia korpo estas kunigita kun la kapo per la kolo. La antaŭaĵo de la kolo nomiĝas la gorgo, kaj la postaĵo la nuko.

La trunko enhavas antaŭe la ŝultrojn, la bruston, la ventron kaj la subventron. Ĉe la du flankoj troviĝas la ripoj kaj la koksoj. Super la koksoj estas la zono aŭ talio. Post la trunko estas la skapoloj kaj la dorso.

En la brusto estas la pulmoj kaj la koro, kaj en la ventro estas la hepato, la stomako kaj la intestoj. La koro batas kaj sendas la sangon en ĉiujn partojn de la korpo. La sango rondiras en la arterioj kaj en la vejnoj.

La membroj estas kvar; tio estas: du brakoj kaj du kruroj. La brakoj estas kunigitaj kun la trunko per la ŝultroj. Meze de la brakoj estas la kubutoj. Ni povas fleksi la brakojn. Fine de la brakoj estas la manoj. Ĉiu mano havas kvin fingrojn, kiuj estas ŝirmitaj per ungoj. Ni uzas la brakojn, la manojn kaj la fingrojn por labori.

La kruroj estas kunigitaj kun la trunko per la koksoj. La supro de la kruro nomiĝas femuro; super la genuo kaj malantaŭe estas la suroj aŭ tibikarnoj. Ni povas fleksi la krurojn kaj surgenuiĝi. Malsupre de la kruro estas la piedo; ĝi enhavas la kalkanon kaj la piedfingrojn.

La kruroj kaj la piedoj ebligas nin stari, paŝi, kuri, danci kaj salti. La homo, kiu ne povas uzi la krurojn, estas paralizito.

QUESTIONNAIRE

1. Per kio la kapo estas kunigita kun la trunko ? — 2. Kiuj estas la diversaj partoj de la trunko ? — 3. Kie troviĝas la ripoj kaj la koksoj ? — 4. Ĉu la dorso troviĝas antaŭe aŭ poste ? — 5. Kie estas la talio ? — 6. Kio estas en la brusto ? — 7. Diru, kion vi scias pri la koro. — 8. Kiom da membroj vi havas ? — 9. Kio kunigas la brakojn kun la trunko ? — 10. Kio estas la kubutoj ? — 11. Kiom da fingroj vi havas en ĉiu mano ? — 12. Per kio la fingroj estas ŝirmitaj ? — 13. Por kio utilas al ni la brakoj, la manoj kaj la fingroj. — 14. Ĉu ni povas fleksi la brakojn kaj la krurojn ? — 15. Kiom da fingroj vi havas en la ambaŭ piedoj ? — 16. Kion vi povas fari per la kruroj kaj piedoj ? 17. Kiel oni nomas homon, kiu ne povas uzi siajn krurojn ?

GRAMMAIRE

Aller, venir de — soit, tantôt, ni répétés.

— Les verbes français *aller* et *venir* sont souvent joints à un autre verbe et jouent le rôle d'auxiliaires. Dans ce cas *aller* se traduit par **tuj** et *venir de* par **ĵus** ; l'infinitif qui suit se rend par un temps personnel, futur ou passé.

Ex. : Je vais lui écrire. *Mi tuj skribos al li.* — Mon ami vient d'arriver. *Mia amiko ĵus alvenis.*

— *Soit... soit* se traduit par **ĉu... ĉu**, *tantôt... tantôt* par **jen... jen** et *ni... ni* par **nek... nek**.

Ex. : Soit aujourd'hui, soit demain. *Ĉu hodiaŭ, ĉu morgaŭ* ; Le temps est tantôt beau, tantôt mauvais. *La vetero estas jen bela, jen malbela.* — Il n'a ni argent, ni ami. *Li havas nek monon, nek amikon.*

Exercices oraux ou écrits.

VERSION

Ni tuj lernos esperanton. Miaj amikoj ĵus eliris. Miaj haroj estis ĵus tonditaj de la frizisto (*aŭ* : komb-isto) de mia frato. Ĉu vi kredas, ke via patrino tuj

reeniros ? La parolado estis ĵus finita, kiam mia kuzo alvenis. La ĉielo estas jen blua jen griza. La vetero estas jen varma jen malvarma. La vetero povas esti ĉu bela ĉu malbela, mia patro promenas ĉiutage. La instruisto estas ĉirkaŭita de la lernantoj. La maljunulo estis vestita per ĉifonoj. La generalo estis mortigita per kuglo pafita de vilaĝano. La supo estis preparita de la kuiristino. Mi ĵus legis tiun libron kaj mi tuj pruntedonos ĝin al mia kamarado. Tiu libro estis donacita al mi de mia onklino. Tiu pentraĵo estis pentrita de mia kuzo. La ĝardeno estis ĵus purigita de la ĝardenisto. Mi tuj klarigos ĝin al vi.

## THÈME

Les doigts des pieds comme les doigts de la main sont protégés par des ongles. Le pauvre homme vient d'être mordu à la jambe par le chien de notre voisin. Quand nos yeux sont fermés, nous ne pouvons pas voir. Le cerveau est protégé par le crâne. Il remuait tantôt les bras, tantôt les jambes. Nous respirons par les poumons. Le menton du vieillard était couvert d'une belle barbe blanche. Je n'ai ni frères ni sœurs ; je suis fils unique. Ces enfants ont de grosses joues fraîches. Nous partirons soit demain, soit après-demain. Ouvrez la bouche et montrez votre langue. Je suis heureux de vous voir ; j'allais vous écrire. Le sang circule dans les veines et dans les artères. Cet homme est très laid : il a une grosse tête, de petits yeux, un long nez, une grande bouche avec de grosses lèvres et de petites oreilles.

## VINGT-QUATRIÈME LEÇON

### Manières de traduire : même.

#### Portreto de amiko.

eble, *peut-être*

tamen, *pourtant, néanmoins*

Mia amiko estas dektrijara, kiel mi. Li estas pli malgranda ol granda laŭ sia aĝo. Li estas nek dika, nek maldika, sed li estas sufiĉe forta. Li havas larĝan frunton, nigrajn okulojn, brunajn harojn, rektan kaj pintan nazon, freŝajn vangojn, mezgrandan buŝon, iom longajn orelojn kaj rondan mentonon. Lia kolo estas longa, liaj ŝultroj kaj lia brusto estas iom larĝaj, kaj liaj brakoj estas fortikaj. Li ne estas mallerta per fingroj kaj manoj. Li estas facilmova per la kruroj kaj piedoj; li grimpas kiel kato, kaj li saltas kaj kuras kiel kapreolo. Tiel li estas ĉiam la unua pri la gimnastiko.

Li amas la laboron, sed li ne forgesas ankaŭ la ludon. En la lernejo, li estas diligenta kaj atenta, sed li ne povas ĉiam sin deteni de babilado, kaj li estas kelkafoje riproĉita kaj eĉ punita.

Li estas aminda, kompleza kaj servema al siaj kamaradoj kaj amikoj, kaj obeema al siaj gepatroj, sed tiuj ĉi ne estas ĉiam kontentaj je li, ĉar li estas kelkafoje neĝentila kaj li ne estas ĉiam afabla al siaj fratinoj. Tamen li amas ilin multe.

Vi vidas, ke mia amiko havas multajn bonajn ecojn; li havas eble kelkajn malgrandajn malbonaĵojn, sed li havas nenian malvirton.

## QUESTIONNAIRE

1. Kioman aĝon havas via amiko ? — 2. Ĉu li estas granda aŭ malgranda laŭ sia aĝo ? — 3. Ĉu li estas dika aŭ maldika, forta aŭ malforta ? — 4. Diru kiel estas lia vizaĝo. — 5. Ĉu li havas longan aŭ mallongan \*kolon ? — 6. Ĉu liaj ŝultroj kaj lia brusto estas largaj ? — 7. Ĉu li estas lerta aŭ mallerta per siaj manoj ? — 8. Ĉu li estas facilmova per siaj kruroj ? — 9. Ĉu li amas la laboron ? — 10. Kiel li kondutas en la lernejo ? — 11. Ĉu li ne kelkafoje babilas kaj ludas ? — 12. Kio okazas al li pro tio ? — 13. Kia li estas kontraŭ la kamaradoj kaj amikoj ? — 14. Ĉu li estas obeema al la gepatroj ? — 15. Ĉu li estas ĉiam afabla al la fratinoj ? — 16. Ĉu li ne amas ilin ? — 17. Kial liaj gepatroj ne estas ĉiam kontentaj je li ? — 18. Ĉu li havas malvirtojn ?

## GRAMMAIRE

Manières de traduire **même**.

— *Même*, adjectif, suivi d'un substantif se traduit par **sama**.

Ex. : Nous demeurons dans la même rue. *Ni loĝas en la sama strato*. — Ils ont les mêmes habitudes. *Ili havas la samajn kutimojn*.

— *Même* adverbe se traduit par **eĉ**.

Ex. : Même les gendarmes pleuraient. *Eĉ la ĝendarmoj ploris*. Je ne pouvais même pas écrire. *Mi ne povis eĉ skribi*.

— *Même* après un pronom ou un nom se traduit par **mem**.

Ex. : Il ira lui-même. *Li iros mem*. — Le jour même de son arrivée, *La tago mem de lia alveno*.

## LEXICOLOGIE

Tiu fraŭlo estas tre **aminda**.

— *Aminda* est formé du verbe *ami*, aimer, et du suffixe **ind**, qui signifie être digne de, mériter de.

Ex. : Kredi, croire ; **kredinda**, digne d'être cru. — Laŭdi, louer ; **laŭdinda**, digne d'éloges, louable. — Kompato, pitié ; **kompatinda**, digne de pitié.



## Exercices oraux ou écrits

## VERSION

Mi ne havas la saman aĝon kiel mia amiko. Ĉiuj homoj ne havas la samajn ecojn. Tiu sinjoro ne estas tre estiminda. La mallaboremaj lernantoj estas riproĉindaj kaj eĉ punindaj. Ĉiuj ĉeestis, eĉ miaj geavoj. Mia patrino mem invitas vin. La reĝo mem eldiris tiujn memorindajn parolojn, kiuj estis cititaj de ĉiuj gazetistoj. Zamenhofo estas honorinda de la tuta homaro. Vi estas mallaŭdinda, ĉar vi faras ĉiam la samajn erarojn. Mi ĵus ricevis la saman libron, kiel mia kamarado. Mia frato aĉetis saman ĉapelon, kiel lia amiko. Ĉu vi tradukis mem tiun taskon? Mi ne povis eĉ du vortojn kompreni. Li alportis mem sian vizitkarton. La horo de Parizo ne estas la sama, kiel tiu de Berlino. Li ne volis atendi eĉ unu minuton.

## THÈME

J'avais un ami. Nous étions nés la même année, le même mois et le même jour. Nous allions à la même école; nous étions de la même classe et nous avions les mêmes camarades. Allez vous-même lui dire de venir. Cet homme n'est pas digne de foi; on ne peut pas croire ce qu'il dit, même s'il dit la vérité. Soyez toujours aimable envers (*al*) les autres et ils le seront envers vous. Les femmes, les vieillards et les enfants même ne furent pas épargnés. Ma mère est morte l'année même de ma naissance. Le danger était si grand, que même les plus braves hésitaient un instant. Le feu s'est propagé si rapidement qu'on n'a même pas pu sauver les meubles. Si vous voulez qu'on vous loue, soyez dignes d'être loués. La lettre que ce jeune homme a écrite à son père n'est pas digne d'être lue; elle n'est même pas lisible. Ce meuble est admirable.

---

## VINGT-CINQUIÈME LEÇON

### Le participe actif.

#### La kvin sentoj.

Mi havas du okulojn, okulon dekstran kaj okulon maldekstran. Mi povas fermi kaj malfermi la okulojn. Mi vidas la libron sur la tablo, la inkujon enhavantan la inkon kaj la plumingon entenantan la plumojn. Mi vidas ĉiujn objektojn, kiuj estas ĉirkaŭ mi. La okuloj, per kiuj mi povas vidi, estas la organoj aŭ la iloj de la vido. Mi ploras ankaŭ per la okuloj. Ferminte la okulojn, mi povas vidi nenion.

Mi havas du orelojn. Per la oreloj mi povas aŭdi. Mi aŭdas la sonoron de la sonorilo, la voĉon de miaj amikoj, la muzikon kaj la kanton de la birdoj. La oreloj, per kiuj mi povas aŭdi, estas la organoj aŭ la iloj de la aŭdado. Kion vi vidas? Kion vi aŭdas?

Per la nazo ni flaras la odoron de la floroj kaj la odoron de la gaso. La rozo odoras bone, ĝi havas bonan kaj agrablan odoron. La nazo estas la ilo de la flarado. Mi spiras ankaŭ kaj mi ternas per la nazo.

Per la lango kaj la palato mi gustumas tion, kion mi manĝas. Mi sentas, ke la sukero estas dolĉa kaj la biero maldolĉa. La lango kaj la palato estas la iloj de la gustumado.

Per la fingroj mi povas tuŝi kaj palpi la objektojn. Mi sentas, ke la ligno estas malmola, ke la karno estas mola; mi sentas, ke la fajro estas varma kaj la glacio malvarma. La fingroj estas la iloj de la palpado.

Homo, kiu povas vidi nur per unu okulo, estas unuokula; tiu, kiu tute ne vidas, estas blinda. Tiu, kiu ne pronuncas bone, balbutas; tiu, kiu ne povas paroli, estas muta, kaj tiu, kiu ne aŭdas, estas surda. Estas homoj, kiuj estas surdamutaj. La miopuloj kaj la malmiopuloj bezonas okulvitrojn por bone vidi.

## QUESTIONNAIRE

1. Kiom da sentoj havas la homo? — 2. Per kio vi vidas? — 3. Kion ni devas fari por vidi? — 4. Kiuj estas la organoj de la vido? — 5. Ĉu vi povas flari per la buŝo? — 6. Per kio vi flaras? — 7. De kio la nazo estas organo? — 8. Ĉu la rozo odoras bone aŭ malbone? — 9. Kion ni faras ankaŭ per la nazo? — 10. Per kio ni aŭdas? — 11. Kiom da oreloj vi havas? — 12. Kion ni aŭdas? — 13. Kiuj estas la organoj de la gustumo? — 14. Kian guston havas la sukero? — 15. Kion ni faras per la fingroj? — 16. Kia estas la ĉefa eco aŭ kvalito de la fajro? — 17. Kia estas la ĉefa eco de la glacio? — 18. Por kio utilas la ligno? — 19. Ĉu la ligno estas mola? — 20. Ĉu vi konas unuokulan homon aŭ unuokululon? — 21. Kio estas blindulo aŭ blinda homo? — 22. Ĉu vi konas surdamutan homon aŭ surdamutulon? — 23. Kiu bezonas okulvitrojn por bone vidi? — 24. Ĉu via avo estas miopa aŭ malproksimvida?

## GRAMMAIRE

Mi vidas la inkujon enhavantan la inkon.

*Enhavanta(n)* est un participe actif.

Le participe actif a trois formes. Il se termine en **int** (passé), en **ant** (présent) ou en **ont** (futur), selon que l'on veut indiquer un fait accompli, ou un fait qui est en train de s'accomplir, ou un fait qui va s'accomplir.

Ex. : La tempo *pasinta* neniam revenos. *Le temps passé ne reviendra jamais.* — Kelkaj fiŝoj povas nur vivi en *fluanta* akvo. *Certains poissons ne peuvent vivre que dans l'eau cou*

*rante* (littéralement : *coulante*). — Esperanto estas certe la *estonta* lingvo helpanta de la tuta mondo. *L'Esperanto est certainement la langue auxiliaire future de l'univers.*

— C'est le participe actif en *inta* qui sert à former, avec le verbe *esti*, seul verbe auxiliaire employé en esperanto, les temps composés du passé.

Ex. : J'ai écrit, *mi estas skribinta* ; j'eus écrit, *mi estis skribinta* ; j'avais écrit, *mi estis skribinta* ; j'aurai écrit, *mi estos skribinta* ; j'aurais écrit, *mi estus skribinta*.

Mais, quand cela est possible sans obscurité, il est préférable d'employer en esperanto, au lieu des formes composées, les formes simples. *Mi skribis* peut ainsi signifier aussi bien : j'ai écrit, j'eus écrit, j'avais écrit, que : j'écrivais ou j'écrivis. *Mi skribus*, signifiera aussi bien : j'aurais écrit, que : j'écrirais.

— Quand le participe a le sens adverbial, c'est à dire quand il ne sert pas d'adjectif qualificatif à un nom ou à un pronom et qu'on ne l'emploie pas pour former le temps composé d'un verbe, il prend en Esperanto la terminaison adverbiale en *e*. Cela arrive en particulier quand le participe est précédé en français de la préposition *en*. Le participe ne peut s'employer adverbialement que s'il se rapporte au sujet de la proposition principale.

Ex. : *Fermante* la okulojn mi vidas nenion. *En fermant les yeux je ne vois rien.* — *Ferminte* la pordon, li foriris. *Ayant fermé la porte, il s'éloigna.*

— Les participes peuvent aussi s'employer substantivement. En ce cas, ils prennent la terminaison *o* :

Ex. : La zorganto, *le tuteur*. — La venkinto, *le vainqueur*. — La mortinto, *le mort*. La mortanto, *le mourant*.

### Exercices oraux ou écrits.

#### VERSION

Montrante la domon, li eksilentis. Vidinte la pluvon, ili prenis siajn mantelojn. Salutinte la gesinjorojn, ili foriris. Aŭskultinte, li aŭdis la voĉon de sia frato. La progresintaj lernantoj estos rekompencitaj. Preferante labori, mi ne promenas.

La promenantoj preferas la sunon pli ol la pluvon. Oni ne vidas hodiaŭ multajn aĉetantojn en la magazenoj. Levante la brakon ŝi prenis la libron sur la ŝranko. Kiaj estas la literoj formantaj tiun vorton? Renkontinte niajn amikojn, ni promenis kun ili. Rekompencante la laboremajn lernantojn, la instruisto kuraĝigas ilin. Oni lernas plej bone per senĉesanta ripetado. La infanoj ne amas silentadi, nek sidadi, nek atendadi; ili kuradas kaj saltadas volonte la tutan tagon. Via babilado estos punita kaj la progresado de via frato estos rekompencita. Mia frato okupas sin pri pentrado. La pafado daŭris kelkan tempon. Sen oreloj la aŭdado estas neebla, sen okuloj la vidado estas neebla. Ridetante ŝi salutis.

## THÈME

La langue espéranto est une langue vivante et non une langue morte. Elle est parlée, écrite et lue par des milliers et des milliers de (*da*) personnes des (*en la*) cinq parties du monde. Ayant été battu par son frère, le petit garçon alla se plaindre à sa mère. En voulant fermer la fenêtre, la jeune fille se blessa à (*je*) la main. Ayant fermé la porte, la domestique retourna à la cuisine. En revenant de l'école les enfants rencontrèrent leurs parents. En arrivant à la maison nous vîmes que la porte était fermée. Le mourant respirait très faiblement. Le défunt fut enterré deux jours après sa mort. En étudiant nos leçons, nous nous endormîmes. En me promenant dans le jardin, je vis arriver mes sœurs. Ayant pris sa plume, il écrivit une longue lettre.

## VINGT-SIXIÈME LEÇON

**Le subjonctif. — Manières de traduire : que.**

### **La manĝoj kaj la manĝaĵoj.**

Estas necese, ke la homo manĝu kaj trinku por vivi, alie li mortas pro soifo kaj malsato. Ni manĝas kiam ni malsatas, kaj ni trinkas, kiam ni soifas, sed ni ne devas manĝi nek trinki pli ol estas bezone. La higieno ordonas, ke ni estu sobraj.

Ni manĝas laŭkutime trifoje ĉiutage. Ni faras tri manĝojn : la matenmanĝon ĉirkaŭ la oka matene, la tagmanĝon aŭ tagmezomanĝon ĉirkaŭ la dekdua, kaj la vespermanĝon je la sepa vespere.

Je la manĝotempo ni iras en la manĝoĉambbron, kie la servistino preparis la manĝilaron. Ŝi surmetis unue la tablotukon, poste la telerojn. Sur la telerojn ŝi metis la telertukojn kaj apude la kulerojn, la forketojn kaj la glasojn. Ŝi zorgis ankaŭ meti sur la tablon la mustardujon kun la mustardo kaj la salujon kun la salo kaj la pipro.

Tio, kion ni manĝas nomiĝas manĝaĵoj aŭ nutr-aĵoj. La pano, la viando, la legomoj kaj la fruktoj estas niaj ĉefaj manĝaĵoj. Ni manĝas diversajn specojn de viando : bovajon, bovidaĵon, ŝafajon kaj porkajon, kuiritan aŭ rostitan. Ni manĝas ankaŭ kortbirdojn, fiŝojn kaj ĉasaĵon. La bovino donas al ni la lakton per kiu oni faras la buteron kaj la fromaĝon, kaj la kortbirdoj, tio estas la kokinoj, la anasoj, la anseroj kaj la meleagroj, liveras al ni la ovojn, per kiuj oni faras ovaĵojn.

Ĉiu sezono alportas al ni aliajn legomojn kaj fruktojn. En printempo, ni havas asparagojn, pizojn, fazeolojn, fragojn, ĉerizojn kaj abrikotojn. En la somero ni manĝas artiŝokojn, napojn, karotojn, spinacojn kaj melonojn, ribojn, grosojn kaj framb-ojn, prunojn kaj persikojn. Dum la aŭtuno kaj la vintro ni havas brasikojn, terpomojn kaj ĉiujn specojn de konservaĵojn, pirojn, vinberojn, pomojn, nuksojn, avelojn kaj migdalojn.

Ni manĝas la salaton krudan : oni spicias ĝin per oleo, vinagro, salo kaj pipro. La aliaj legomoj estas kuiritaj. Ni manĝas fine la fruktojn krudajn aŭ kuiritajn, kiel kompoton aŭ konfitajon.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kion bezonas la homo por vivi ? — 2. Kio okazas al li, se li tion ne havus ? — 3. Kiam ni manĝas ? Kiam ni trinkas ? — 4. Kiel ni devas konduti pri la manĝado kaj la trinkado ? — 5. Kiom da fojoj ni manĝas ĉiutage ? — 6. Je kioma horo vi matenmanĝis hodiaŭ ? — 7. Je kioma horo vi tagmanĝas ? — 8. Kiel oni nomas la manĝon de tagmezo ? — 9. Kiu estas la tria manĝo ? — 10. Je kioma horo vi vespermanĝas ? — 11. Kien ni iras, kiam ni volas manĝi ? — 12. Kiu aranĝis la tablon ? — 13. Rakontu, kiel la servistino aranĝas la tablon. — 14. Kion oni nomas manĝaĵoj aŭ nutraĵoj ? — 15. Kiuj estas niaj ĉefaj nutraĵoj ? — 16. Kiajn viandojn ni manĝas ? — 17. Kion oni faras el la lakto ? — 18. Kiu donas al ni la ovojn ? — 19. Kiel ni manĝas la viandon ? Ĉu kruda aŭ kuirita ? — 20. Nomu kelkajn printempajn legomojn. — 21. Kiuj estas la fruktoj, kiujn ni manĝas en somero ? — 22. Kiam ni manĝas brasikojn, lentojn, pomojn kaj nuksojn ? — 23. Kiel oni spicias la salaton ? — 24. Kiel ni manĝas la fruktojn ? Ĉu krudaj aŭ kuiritaj ?

## GRAMMAIRE

Estas necese, ke la homo manĝu kaj trinku.  
La higieno ordonas, ke ni estu sobraj.

— Le subjonctif de même que l'impératif est caractérisé par la désinence **u**.

— On emploie le subjonctif après un verbe qui exprime *l'obligation, le commandement ou le désir et la volonté*.

Ex. : Je veux que vous veniez. *Mi volas, ke vi venu.* — Dites-lui de ne pas bavarder. *Diru al li, ke li ne babilu.* — Il faut que nous partions. *Estas necese, ke ni foriru.* — Je désire, que vous répondiez. *Mi deziras, ke vi respondu.*

Différentes manières de traduire **que** :

— *Que* après un verbe, se rend par **ke** ; après un substantif par **kiun** ou **kiujn** ; après un adjectif et en général dans une comparaison par **ol**.

Ex. : Je sais que... *Mi scias, ke...* — Le livre que... *La libro, kiun...* — Plus grand que... *Pli granda ol...* — Plus de vin que... *Pli da vino ol...*

— *Que* signifiant *quoi* se rend par **kio**, **kion** ; lorsqu'il signifie *combien* par **kiom** ; dans le sens de *comment* par **kiel** ; et dans le sens de *quand* par **kiam**.

Ex. : Que dites-vous ? *Kion vi diras ?* — Que d'eau ! *Kiom da akvo !* — Que la mer est belle ! *Kiel la maro estas bela !* — Nous étions à peine arrivés que la pluie commença. *Ni estis apenaŭ alvenintaj, kiam la pluvo komencis.*

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

Via patro deziras, ke vi venu. La kuracisto petas, ke oni fermu la pordon kaj malfermu la fenestron. Elparolu zorge tiujn literojn, por ke oni komprenu vin facile. Parolu pli laŭte, por ke via avino povu aŭdi vin. Mia amiko petas, ke mi respondu al li hodiaŭ. Mia patrino ne permesis, ke mi venu. Preninte mian vortaron, mi serĉis la vortojn, kiujn



mi ne konis. Kiom da ŝipoj estas en la ŝiparo? Nia kuracisto havas multan klientaron. La vagonaro estas formita per (ou: el) dek-du vagonoj. La ŝtuparo de nia domo havas nur dudek-du ŝtupojn. En aŭtuno la brutaroj revenas el la montaro. Kion respondis la servisto? Kiel vi estas babilemaj! Kiom da tempo mi perdis! Diru al la servantino, ke ŝi ekbruligu la fajron kaj pretigu la manĝon. Estas bezone, ke ni iru ĉe la libriston. Estas necese, ke vi faru pli da progresoj.

## THÈME

Mon père ne veut pas que je sorte aujourd'hui. Il faut que j'aille au marché pour acheter des fruits. Son ami désire que vous répondiez à sa lettre. Dites à votre cousin qu'il aille avec vous. Le maître ordonna aux élèves de quitter l'école. Savez-vous que votre ami est là? Je ne crois pas qu'il arrivera aujourd'hui. Le livre que j'ai acheté hier est plus intéressant que celui que vous m'avez prêté. Vous avez plus de livres que de cahiers. Que vous répondit cet homme? Que de fleurs dans cette prairie! Voulez-vous que je vienne à deux heures? Que votre sœur est heureuse! Avez-vous dit à la bonne de mettre la table? La viande que le boucher a envoyée ce matin est moins belle que celle que j'ai achetée hier.

## VINGT-SEPTIÈME LEÇON

**Conditionnel. — Manières de traduire : si.**

### **Se mi estus riĉa.**

Se mi estus riĉa, mi havus sur la deklivo de ombrita monteto malgrandan vilaĝan domon, blankan kun verdaj fenestrovkroviloj. Kvankam pajla tegmento estas en ĉiu ajn sezono la plej bona, mi preferus la tegolon tial, ke ĝi havas mienon pli puran kaj pli gajan, ke oni ne kovras alimaniere la domojn en mia lando, kaj ke tio memorigus al mi la tempon de mia juneco. Se mi estus riĉa, mi havus anstataŭ kortego birdkorton kaj anstataŭ ĉevalejo bovinejon (aŭ bovstalon) por ke mi havu lakton, kiun mi amas multe. Mi havus legomoĝardenon anstataŭ florigardeno kaj anstataŭ parko beletan fruktoĝardenon.

Se mi estus riĉa, mi kunvenigus tien kelkajn bonajn amikojn kiuj ŝatus la kamarajn plezurojn. Tie ĉiuj niaj manĝoj estus festenoj. La manĝoĉambro estus ĉie ; oni havus la herbetaron por tablo kaj por seĝoj ; la randoj de la fonto utilis (aŭ servus) por telermeblo, kaj la deserto pendus de la arboj. Por ke ni estu niaj mastroj, ni ne havus servistojn, kiuj kalkulus la pecojn de niaj manĝaĵoj kaj lasus nin atendi, por amuzi sin. Ĉiu mem servus al si.

Se okazus ia vilaĝa festo, mi tien ĉeestus inter la unuealvenantoj. Se ia edziĝo fariĝus en mia naj-

baraĵo, oni sciis, ke mi amas la ĝojon, kaj mi estus invitita. Mi alportus al tiuj bonaj homoj ian donacon simplan, kiel ili, kaj mi trovus interŝanĝe la malkaŝemon kaj la veran plezuron. Mi vespermanĝus ĉe ilia tablo, mi kantus kun ili, kaj mi dancus en ilia garbejo pli volonte ol en la opera balo.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kian domon vi havus se vi estus riĉa? — 2. Kial vi preferus tegolan tegmenton? — 3. Kion memorigis al vi tia tegmento? — 4. Kion vi havus anstataŭ kortego? — 5. Kial vi havus bovinejon anstataŭ ĉevalejon? — 6. Ĉu vi havus florgardenon aŭ parkon? — 7. Kiajn amikojn vi invitus? — 8. Kie estus via manĝoĉambro? — 9. Kion vi havus anstataŭ tablo kaj seĝoj? — 10. Kial vi ne havus servantojn? — 11. Kion vi farus se estus ia vilaĝa festo? — 12. Kial vi estus invitita, se fariĝus ia edziĝo en via najbaraĵo? — 13. Kion vi alportus al tiuj bonaj homoj? — 14. Kion vi farus ĉe tia okazo?

#### GRAMMAIRE

Se mi estus riĉa, mi havus malgrandan domon.

— La désinence **us** ajoutée au verbe indique le conditionnel.

— En esperanto le conditionnel traduit non seulement le conditionnel français, mais aussi l'imparfait après la conjonction **si**.

Ex. : Se mi vidus lin, mi dirus al li... *Si je le voyais je lui dirais...*

Manières de traduire **si** :

— *Si* conditionnel se traduit par **se**.

Ex. : S'il venait, je vous préviendrais. *Se li venus, mi informus vin.* — S'il était venu, je vous aurais prévenu. *Se li estus veninta, mi estus informinta vin.*

— Dans le sens de *tellement*, *si* se traduit par **tiel**.

Ex. : Le temps était *si* mauvais! *La vetero estis tiel malbona!*

— Après un verbe, *si* se traduit par **ĉu**.

Ex. : Demandez-lui s'il viendra. *Demandu al li, ĉu li venos.*

Remarque : *Si* affirmatif, dans le sens de *oui*, se traduit par **jes, jes ja, ja vere**.

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

Se mi estus sana, mi estus feliĉa. Mi ĝin farus, se mia patro ĝin permesus. Li min frapus, se li ne timus. Mi vizitus lin, se li tion dezirus. Se la suno brilus, la vetero estus pli varma. Se pluvos, ni ne promenos. Se vi vidus Petron, diru al li, ke li aĉetu tiun libron. Se la lernantoj ne laboras, ili ne progresas. Se la lernantoj ne laborus, ili ne progresus. Se mi lin renkontus, mi ne povus lin rekoni. Se mi povus, mi aĉetus la tutan verkaron de Zamenhof. Se vi atente aŭskultus, vi komprenus tion, kion mi diras. Se vi forgesos, vi estos punita. Mi ne scias, ĉu via patro estas hejme. Demandu lin, ĉu li povas atendi kelkajn minutojn. Mi estus tre kontenta se mi scius esperanton. Se mi scius esperanton, mi ne bezonus lerni aliajn lingvojn. Demandu vian amikon, ĉu li volas lerni esperanton. Ĉu vi rekonus min, se vi vidus min sen mia barbo?

## THÈME

Nous nous promènerions si le temps n'était pas si mauvais. S'il ne pleuvait pas en été, la terre se desséchera. Cet homme ne serait pas si malheureux s'il avait travaillé pendant sa jeunesse. Si ces enfants étaient sages et s'ils travaillaient mieux, leurs parents seraient contents et heureux. Nous n'achèterions pas le pain chez ce boulanger, s'il n'était pas toujours très bon. Pouvez-vous me dire si monsieur votre père est à la maison? Si je le savais je vous le dirais. Si vous aviez faim, mon petit ami, vous ne trouveriez pas votre pain amer. Cet appartement me plairait, s'il avait une chambre de plus (*plie*). Demandez à votre ami s'il veut revenir avec nous. J'ai bien soif; je boirais avec plaisir un verre d'eau fraîche. Si jeunesse savait, si vieillesse pouvait, dit un vieux proverbe.

## VINGT-HUITIÈME LEÇON

**Manières de traduire : beaucoup, peu.**

### **La malkara vespermanĝo.**

#### 1. ANTAŬ LA MANĜO

*La gasto.* — Sinjoro gastigisto, ĉu mi povas vespermanĝi ĉe vi por mia mono?

*La gastigisto.* — Certe, sinjoro. Kion vi deziras manĝi? Unue supon?

*La gasto.* — Jes. Mi manĝos kun plezuro bonan supon.

*La gastigisto.* — Poste pecon da bovo kun legomoj. Kian rostajon vi preferas? Ni havas bovidrostajon kaj ŝafrostajon.

*La gasto.* — Mi preferas la ŝafrostajon, kaj se vi volos doni al mi poste iom da fromaĝo kaj fruktojn por la deserto, mi manĝos kiel princo. Ĉu mi povas havi ankaŭ botelon da vino kaj tason da kafo por mia mono?

*La gastigisto.* — Sendube, sinjoro, kaj mi havas bonegan vinon. Ĉu vi deziras ruĝan aŭ blankan vinon?

*La gasto.* — En somero, mi preferas la blankan vinon.

*La gastigisto.* — Bonvolu sidiĝi ĉe tiu ĉi tablo, sinjoro; la kelnero servos tuj al vi.

## 2. POST LA MANĜO

*La gastigisto.* — Ĉu vi bone vespermanĝis, sinjoro?

*La gasto.* — Tre bone, sinjoro gastigisto, kaj jen estas mia mono.

*La gastigisto.* — Kiel! Kvindek centimoj? Vi ŝaldas al mi kvin frankojn, sinjoro. Jen la kalkulo.

*La gasto.* — Kvin frankoj! Pardonu, sinjoro gastigisto, mi ne petis de vi manĝon por kvin frankoj, sed por mia mono. Jen ĝi, mi ne havas pli da ĝi.

*La gastigisto.* — Mi vidas, ke vi estas petolulo, kaj vi meritus koniĝi kun la polica komisaro. Sed mi donacas al vi vian vespermanĝon, kaj mi eĉ aldonas moneron da du frankoj. Vi nur ne parolos eĉ unu vorton pri la afero, kaj iros alian fojon ĉe mian najbaron, la gastigiston de la « Blanka Urso. »

*La gasto.* — Via najbaro de la « Blanka Urso! » sed mi tagmanĝis ĉe li, kaj ĝi estas li, kiu sendis min al vi.

## QUESTIONNAIRE

1. Kion oni rakontis tie ĉi supre? — 2. Pri kio la kliento demandas la hoteliston aŭ gastigiston? — 3. Kion la gastigisto donas al li por manĝi? — 4. Kial li ne donis al li bovidan rostaĵon? — 5. Kian deserton li petis? — 6. Kion li petis por trinki? — 7. Ĉu la gastigisto havis bonan vinon? — 8. Kion preferis la kliento? Ĉu ruĝan aŭ blankan vinon? — 9. Kiu servis al la kliento? — 10. Kiom da mono donis la kliento? — 11. Ĉu la gastigisto estis kontenta? — 12. Kiom petis la gastigisto por la manĝo? — 13. Kion klarigas al li la kliento? — 14. Kion fine faris la gastigisto? — 15. Kion li konsilas al la kliento? — 16. Ĉu la kliento povis iri al lia najbaro?

## GRAMMAIRE

## Manières de traduire beaucoup, peu :

— *Beaucoup*, employé seul, se traduit par **multe** ; suivi de *de* il se traduit par **multe da** ou **multaj**.

Ex. : Avez-vous mangé beaucoup ? *Ĉu vi manĝis multe ?* — Nous avons bu beaucoup de bière. *Ni trinkis multe da biero.* — Ils ont beaucoup d'amis. *Ili havas multajn amikojn.*

— *Peu*, employé seul, se traduit par **malmulte** et *peu de* par **malmulte da** ou **malmultaj**.

Ex. : Comme vous mangez peu ! *Kiel vi manĝas malmulte !* — Il est peu appliqué. *Li estas malmulte laborema.* — Il y a peu d'eau dans la carafe. *Estas malmulte da akvo en la karaf.* — Peu de livres sont aussi instructifs. *Malmultaj libroj estas tiel instruaj.*

— *Un peu* se traduit par **iom**, *un peu de* par **iom da** et *peu à peu* (*petit à petit*) par **iom post iom**.

Ex. : Je comprends un peu. *Mi komprenas iom.* — Mangez un peu de viande. *Manĝu iom da viando.* — Les jours grandissent peu à peu. *La tagoj pli grandiĝas iom post iom.* — Petit à petit l'oiseau fait son nid. *Iom post iom la birdo faras sian neston.*

## LEXICOLOGIE

*Mono*, monnaie ; *monero*, pièce de monnaie ; *hajlo*, grêle ; *hajlero*, grêlon ; *neĝo*, neige ; *neĝero*, flocon de neige ; *fajro*, feu ; *fajrero*, étincelle ; *greno*, blé ; *grenero*, grain de blé.

Le suffixe **er** indique l'élément, la parcelle, l'unité partielle.

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

Mi fartas multe pli bone de kiam (*depuis que*) mi manĝas multe da legomoj kaj malmulte da viando. Ĉu vi deziras ankoraŭ iom da pano ? Mi dankas, mi havas sufiĉe da ĝi. Neniu amiko vizitis min, dum mi estis malsana. Esperanto faras multajn

progresojn de (*depuis*) kelkaj jaroj. Ne estas plu sufiĉe da inko en la inkujo. Estis tro da vinagro en la salato. Estas multe malpli da reguloj en la esperanta gramatiko ol en la gramatiko de ia ajn alia lingvo ; tial neniu lingvo estas tiel facila kiel esperanto. Esperanto estas ankaŭ multe pli fleksebla ol la aliaj vivantaj lingvoj. Falis tiun ĉi nokton iom da neĝo, kaj la vetero fariĝas iom malvarma. Mia onklo havas multajn librojn. Nia ĝardeno donis al ni tiun ĉi jaron mal-multe da fruktoj sed multe da legomoj. Ne estas multaj domoj en la vilaĝeto. La arbo grandiĝas iom post iom. Ĉu via kuzo multe laboras ?

## THÈME

Ce livre me plaît beaucoup. J'ai lu beaucoup de livres, mais j'en ai trouvé peu (d')aussi instructifs. Donnez-moi encore un peu de cette viande. Cette année il n'y a pas beaucoup de monde au bord de la mer. Nous mangeons beaucoup de légumes et nous buvons très peu. Peu de personnes savent cela. Comprenez-vous déjà un peu la langue esperanto ? En automne les jours diminuent peu à peu. Avez-vous beaucoup de pièces de monnaie comme celle-ci ? Je vous prie de ne pas dire un mot de cette affaire. L'aubergiste comprit que le client était (*est*) un farceur. Cher ami, je n'ai que peu d'argent, je ne peux pas payer cinq francs pour un dîner. Après mon dîner je bois toujours une tasse de café. Quel vin préférez-vous ? Préférez-vous le rôti de veau ou le rôti de mouton ? J'aime les deux (*ambaŭ*) mais je préfère le rôti de bœuf.



## VINGT-NEUVIÈME LEÇON

**Manières de traduire : Aussi, tant, autant.**

### **La trinkaĵoj.**

Ni trinkas por kvietigi nian soifon. Tio, kion ni trinkas, nomiĝas trinkaĵo. Ni trinkas ĉiuspecajn trinkaĵojn ; la unuj estas varmaj, la aliaj malvarmaj.

En la matenmanĝo ni trinkas teon kun lakto aŭ sen lakto, kafon kun lakto, kakaon aŭ ĉokoladon. En la tagmanĝo ni trinkas vinon kun akvo ordinara aŭ minerala. En kelkaj landoj oni trinkas pomvinon, kaj en aliaj bieron. Se ni soifas inter la manĝoj, ni trinkas bieron aŭ akvon kun siropo.

La akvo pura estas la plej bona kaj plej sana el ĉiuj trinkaĵoj. Ĝi estas ankaŭ la sola sen kiu ni ne povas vivi. Oni prenas ĝin el la fonto, sed oni aĉetas la vinon kaj la pomvinon ĉe la vinvendisto, la bieron ĉe la bieristo aŭ bierfaristo.

Estas ruĝa kaj blanka vino, hela aŭ blonda, malhela aŭ bruna biero. La ĉampano estas ŝaŭmanta vino. La vino, la biero kaj la pomvino estas konservataj en bareloj.

Oni alportas la akvon en karafo, la vinon en botelo kaj la kafon en kruĉo. Ni trinkas la ĉampanon el kaliko, la vinon el glaso kaj la kafon el taso.

Estas ankaŭ aliaj trinkaĵoj, ekzemple : brando, konjako, rumo, viskio, ĉerizbrando. Tio estas alkoholaj trinkaĵoj kaj ne estas bonaj por la sano.

Oni devas esti sobra ; la malsobreco estas malvirto kaj kondukas al malsano.

## QUESTIONNAIRE

1. Pri kio estis la temo de tiu ĉi leciono? — 2. Kion oni nomas trinkaĵo? — 3. Kion ni trinkas matene? — 4. Kiujn trinkaĵojn ni trinkas dum la tagmanĝo? — 5. Kion ni trinkas, se ni soifas inter la manĝoj? — 6. Kiu estas la plej saniga el ĉiuj trinkaĵoj? — 7. Ĉu ni povas neuzi tiun trinkaĵon? — 8. Kie ni trovas la akvon? — 9. Kiu vendas al ni vinon kaj pomvinon? — 10. Kiu vendas al ni la bieron? — 11. Ĉu vi preferas ruĝan aŭ blankan vinon? — 12. Kio estas la ĉampano? — 13. En kio oni konservas la vinon? — 14. En kio oni alportas la akvon? — 15. Kiun trinkaĵon oni alportas en kruĉo? — 16. El kio ni trinkas la vinon? — 17. El kio ni trinkas la kafon? — 18. Ĉu la alkoholaj trinkaĵoj utilas al la sano? — 19. Nomu kelkajn alkoholajn trinkaĵojn.

## GRAMMAIRE

Manières de traduire aussi, tant, autant :

— *Aussi* se traduit par **ankaŭ** quand il signifie *en outre* et par **tial** quand il signifie *c'est pourquoi*.

Ex. : Nous avons des pommes et aussi des poires. *Ni havas pomojn kaj ankaŭ pirojn.* — Aussi n'est-il pas venu. *Tial li ne venis.*

— *Aussi... que* se traduit par **tiel... kiel**.

Ex. : Je ne suis pas aussi grand que mon frère. *Mi ne estas tiel granda, kiel mia frato.*

— *Si... que* se traduit par **tiel... ke**.

Ex. : Le temps était si mauvais que je n'ai pu venir. *La vetero estis tiel malbela, ke mi ne povis veni.*

Comparez : Aussi tôt, **tiel frue** et aussitôt, **tuj**.

— *Tant* se traduit par **tiom**. Suivi de *de* il se traduit par **tiom da**.

Ex. : Il a tant plu que je n'ai pas pu sortir. *Pluvis tiom, ke mi ne povis eliri.* — J'ai tant de livres, que je ne sais où les mettre. *Mi havas tiom da libroj, ke mi ne scias kien meti ilin.*

— Les locutions *tant mieux, tant pis, tant que* se traduisent respectivement par **des pli bone, des pli malbone, dum** ou **tiel longe kiel**.


Ex. : Tant que je vivrai, *Dum mi vivos*, ou : *tiel longe, kiel mi vivos*.

— *Autant*, employé seul, se traduit par **tiel multe** ; *autant de*, par **tiom da** ; *autant de... que (de)* par **tiom da... kiom (da)** ; et *autant... que* par **tiom... kiom**.

**Exercices oraux ou écrits.**

VERSION

Mi ne havas tiom da libroj, kiom mia onklo. Ĉu via frato ankaŭ forestas? Ĉu via frato ankoraŭ forestas? Paŭlo fervore laboris; tial li estos rekompenkata. Parizo ne estas tiel granda kiel Londono. Mi tiom foliis mian esperantan vortareton, ke ĝi estas tute malpura. La vetero estas tiel malvarma, ke oni devis ekbruligi la fajron. Via kuzo estas tiel mallaborema, ke li ne ankoraŭ komencis sian taskon. Tiu tranĉileto tranĉas tiel malbone, ke mi ne povis pintigi mian krajonon. Estas tiom da silaboj en la vorto « sonorilo » kiel en la vorto « servistino », sed la lasta enhavas pli da literoj. Ĉu vi havas tiom da floroj en via ĝardeno, kiel ni? La rozo ne daŭras tiel longe, kiel la krizantemo. La ĝardenisto ne plantis tiom da pomujoj, kiom da pirujoj. Tiel longe kiel mi vivos, mi estos danka al li. Dum tiu sinjoro ĉeestos, mi ne eniros. Petro ne estas tiel atenta, kiel Paŭlo. La vintro ne estas tiel agraba kiel la somero. Mi ne vojaĝis tiom, kiom mia frato. La knabinoj ne estas tiel fortaj, kiel la knaboj.



## THÈME

Nous avons mangé non seulement (*ne nur*) du pain et du beurre, mais aussi du fromage et des fruits. Avez-vous aussi bu du vin? Non, nous ne buvons jamais de vin; nous ne buvons que de l'eau pure: c'est la meilleure et la plus saine de toutes les boissons. Charles a été désobéissant, aussi a-t-il été puni par son père. Est-ce que le cacao est aussi nourrissant que le chocolat? Donnez-moi autant de café que de lait. J'ai reçu trois lettres ce matin et ma sœur autant. Cette année il y a tant de pommes, que le cidre ne sera pas cher. Tant mieux pour les gens pauvres. Tant que le vent viendra du nord, il fera beau temps. Autant que j'ai pu voir, il n'y avait pas d'eau-de-vie sur la table. Nous avons bu autant d'eau que de vin. J'ai bien soif; je boirais avec plaisir un verre de bière. Nous buvons autant de vin rouge que de vin blanc. Aimez-vous le champagne? Faites-moi le plaisir d'accepter cette coupe. Je n'en ai jamais goûté d'aussi bon. Il s'est levé aussitôt, quoique, on ne l'ait jamais réveillé aussi tôt.

## Phrases usuelles.

Il faut que je m'en aille.	<i>Mi devas foriri.</i>
Voulez-vous déjà partir?	<i>Ĉu vi volas jam foriri?</i>
Parlez-vous sérieusement?	<i>Ĉu vi parolas malŝerce?</i>
Faites mes compliments à M. votre père.	<i>Prezentu miajn komplimentojn al via patra moŝto.</i>

## TRENTIÈME LEÇON

### Manières de traduire : plus et moins.

#### La vestoj.

Ni surmetas vestojn por kovri nian korpon kaj ŝirmi ĝin kontraŭ malvarmo kaj varmo. En somero ni vestigas malpeze kaj en vintro varme. La somer-vestoj estas ĝenerale el tolo aŭ el katuno, kaj la vintrovestoj estas el lano. La sinjorinoj uzas ankaŭ vestaĵojn el veluro kaj silko.

La pantalono, la veŝto, la ĵaketo, la jako, la redingoto estas viraj vestoj. La jupo, la subjupo, la robo estas virinaj vestoj. En vintro la viroj surmetas ankaŭ surtuton aŭ superveston kaj la sinjorinoj peltan mantelon kaj mufon. La virinaj vestoj estas ornamitaj per brodaĵoj, rubandoj kaj punktoj.

La tajloro faras la virajn vestojn, kaj la kudristo aŭ kudristino la virinajn vestojn. La tajloro mezuras, tranĉas la ŝtofon per tondiloj kaj kudras la vestojn per kudrilo kaj fadeno. Li faras la butontruojn kaj kudras la butonojn kaj poŝojn; antaŭ ol liveri al ni vestojn, li provas ilin kaj gladas ilin per gladilo.

Ni aĉetas la ĉemizojn, kolumojn, ŝtrumpojn kaj ŝtrumpetojn, la ŝelkojn, kravatojn, gantojn kaj ŝtrump-  
ligilojn ĉe la ĉemizisto, kaj la ŝuojn, la pantoflojn, la botojn ĉe la ŝuisto.

Sur la kapo ni metas ĉapelon, en somero pajlan ĉapelon, kaj en vintro feltan aŭ silkan ĉapelon. La

ĉapelisto faras la virajn ĉapelojn, kaj la modistino la virinajn ĉapelojn. La knaboj uzas kutime ĉapon. La virinoj uzas ankaŭ juvelojn el oro aŭ arĝento kun perloj, diamantoj kaj aliaj gemoj.

#### QUESTIONNAIRE

1. Por kio ni surmetas vestojn? — 2. Kiamaniere ni nin vestas en somero?... en vintro? — 3. El kio estas faritaj niaj someraj vestoj? — 4. Ĉu la vintraj vestoj estas ankaŭ el tolo? — 5. Kiu surmetas vestojn el silko kaj el veluro? — 6. Nomu kelkajn virajn vestojn. — 7. Kiujn vestaĵojn havas la sinjorinoj en vintro? — 8. Per kio estas ornamitaj la sinjorinaj vestoj? — 9. Kiu faras la virajn vestojn? — 10. Kion faras la kudristo kaj la kudristino? — 11. Diru, kion faras la tajloro por fabriki veston? — 12. Por kio li tranĉas la ŝtofon? — 13. Kion li bezonas por kudri? — 14. Kiom da poŝoj vi havas sur via veŝto? — 15. Kiom da butonoj sur via jako? — 16. Kion faras la tajloro antaŭ ol liveri la vestojn? — 17. Kion ni aĉetas ĉe la ĉemizisto? — 18. Kion ni surmetas sur la kapon? — 19. Kiu faras la sinjorinajn ĉapelojn? — 20. Kiel oni nomas tiun, kiu faras la virajn ĉapelojn? — 21. Kiu surmetas kutime ĉapon?

#### GRAMMAIRE

##### Manières de traduire plus et moins :

— *Plus*, employé seul, se traduit par **pli multe** et *le plus* par **la plej multe** ou **plej multe**.

Ex. : Il a dit plus encore. *Li diris ankoraŭ pli multe*. — C'est lui qui a gagné le plus. *Li gajnis plej multe*.

— *Plus... que* se traduit par **pli... ol** ; *plus de... que* par **pli da** ou **pli multe da... ol** et *plus de... que de* par **pli da** ou **pli multe da... ol da**.

Ex. : Il est *plus grand que* son frère. *Li estas pli granda ol lia frato*. — J'ai plus de livres que vous. *Mi havas pli multe da libroj ol vi*. — Il promet plus de beurre que de pain. *Li promesis pli da butero ol da pano*.

— *Le plus possible* se traduit par **kiel eble plej multe** ; *le plus de... possible* par **kiel eble plej multe da...**

Ex. : Marchez le plus possible. *Marŝu kiel eble plej multe.*  
— Prenez le plus d'eau possible. *Prenu kiel eble plej multe da akvo.*

— Combiné avec un adjectif ou un adverbe *le plus possible* se traduit par **kiel eble plej** suivi de l'adjectif.

Ex. : Le plus tôt possible. *Kiel eble plej frue.* — Le plus grand possible. *Kiel eble plej granda.*

— Les locutions *ne... plus, non plus, au plus, de plus* ou *en plus, de plus en plus* et *plus... plus* se traduisent respectivement par **ne plu** ou **jam ne**, **nek ankaŭ**, **pleje**, **pli kaj pli**, **ju pli... des pli**.

Ex. : Je n'ai plus faim. *Mi ne plu (jam ne) malsatas.* — Je n'ai pas soif non plus. *Nek mi soifas ankaŭ.* — Il devient de plus en plus riche. *Li iĝas pli kaj pli riĉa.* — Plus on apprend, plus on sait. *Ju pli oni lernas, des pli oni scias.*

— Remarquez la différence entre *plus tôt*, **pli frue** et *plutôt*, **prefere, pli vole (ol)**.

— Pour traduire les locutions correspondantes formées avec *moins*, on fait précéder les mots **plej, pli** ou **multe** du préfixe **mal**, qui marque le contraire.

Ex. : Buvez le moins du vin possible. *Trinku kiel eble malplej multe da vino.* — J'ai moins d'amis que lui. *Mi havas malpli multe da amikoj ol li.*

### Exercices oraux ou écrits.

#### VERSION

Johano estas pli forta ol Georgo. Ŝi kuras pli rapide ol vi. La ĉevalo estas malpli forta ol la kamelo. Mia frato amas sian filon pli ol sian filinon. La elefanto estas la plej granda kaj la plej forta el la bestoj. Georgo estas la malplej kuraĝa knabo en la lernejo. Vi estas la malplej laboremaj el ĉiuj lernantoj. Ju pli mi lin konas, des pli mi lin estimas. Ju malpli mi mangas, des pli mi trinkas.

Ju malpli oni trinkas, des malpli oni soifas. Ju pli mi lin vidas, des malpli li plaças al mi. Ju pli la vintro alproksimiĝas, des pli estas malvarme. Tiu ŝtofo enhavas pli da kotuno ol da lano. La tagoj fariĝas pli kaj pli mallongaj. Venu kiel eble plej baldaŭ. Li leviĝas kiel eble plej malfrue. Parizo enhavas malpli da loĝantoj ol Londono. Ĉu vi deziras iom pli da viando? Mi dankas, mi ne deziras pli da ĝi. Kiam ni alvenis, neniu jam tie estis. Mi ne faros unu paŝon plu. Li promesas, ke li ne faros plu tion. Mi lin amas pli kaj pli. La infanoj ordinare pli preferas ludi, ol labori. La malsanulo ne vivos pli ol unu tagon. Kiam vi revenos, li ne plu vivos.

## THÈME

Vous avez beaucoup de cravates, mais mon ami (en) a plus. Charles travaille plus que son frère, mais Louise travaille le plus. Les habits de laine sont plus chauds que les habits de coton. Ses yeux étaient plus grands que son estomac. Apprenez le plus possible pendant que vous êtes jeunes. Ecrivez-lui le plus tard possible. Son frère n'avait plus d'argent et lui non plus. Donnez-moi deux ou trois feuilles de plus. Ils étaient au plus une vingtaine, mais au moins une quinzaine. Cette chambre est moins grande que la mienne; c'est la moins grande de l'appartement. Il a choisi le plus petit possible. Le temps devenait de plus en plus mauvais et nous sortions de moins en moins. Plus les hommes travaillent, plus ils sont heureux. On ne voit plus monsieur Martin; est-ce qu'il serait malade? Ayez le moins d'amis possible, mais qu'ils soient les meilleurs possible.




## TRENT-ET-UNIÈME LEÇON

### Manières de traduire : tout.

#### Julo faras sian tualeton.

Julo devas leviĝi je la sepa, sed li dormas ankaŭ profunde. La servistino purigis jam liajn ŝuojn kaj metas ilin antaŭ lian pordon. Ŝi frapas ĉe la pordo por vekigi lin. Julo vekigas. Li frotas al si la okulojn, oscedas, etendas la membrojn kaj rigardas kioma horo estas ĉe la vekhorloĝo. Estas la horo por leviĝo. Tuj li elsaltas el la lito, surmetas sian kalsonon, siajn ŝtrumpojn kaj siajn pantoflojn; poste li iras al sia tualettablo.



Tie, li prenas la akvo-kruĉon kaj verŝas akvon en la pelveton. Post tio, li trempas la spongon en la akvon kaj purigas sian vizaĝon, siajn orelojn kaj sian kolon.

Kiam Julo sin tiel lavis, li viŝas sin per manviŝilo, brosas kaj kombas la harojn per harbroso kaj komb-

ilo. Li neniam forgesas brosi la dentojn per dentbroso kaj pulvero aŭ dentakvo, kaj poste gargari la buŝon per iom da akvo. Fine li devas lavi siajn manojn. Li frotas ilin forte per sapo kaj li brosas zorge siajn ungojn per la unĝobroso. Nun li estas tute pura, kaj li tuj vestas sin.

## QUESTIONNAIRE

1. Je kioma horo devas Julo sin levi? — 2. Ĉu li vekigis? —  
 3. Kiu vekas lin? — 4. Kion faras la servistino por veki lin? —  
 5. Kion faras Julo, kiam li estas vekita? — 6. Kien li rigardas,  
 kioma horo estas? — 7. Kion li surmetas levante sin? — 8. Kien  
 li iras por lavi sin? — 9. Diru ĉion, kion li faras sin lavante. —  
 10. Per kio li viŝas sian vizaĝon? — 11. Per kio li kombas kaj  
 brosas siajn harojn? — 12. Ĉu li forgesas lavi siajn dentojn? —  
 13. Kion li uzas por purigi kaj brosi la dentojn? — 14. Per kio  
 li lavas siajn manojn? — 15. Kion li faras per la unĝobroso?

## GRAMMAIRE.

Manières de traduire **tout** :

— *Tout* signifiant *chaque, chacun*, se traduit par **ĉiu** et *tous, toutes, tous les, toutes les* par **ĉiuj**.

Ex. : Tout homme doit travailler. *Ĉiu homo devas labori.*  
 — Tous étaient-ils là? *Ĉu estis ĉiuj tie?* — On a fermé toutes  
 les portes. *Oni fermis ĉiujn pordojn.*

— *Tout* signifiant *chaque chose* se traduit par **ĉio**; *tout ce qui* par **ĉio, kio** et *tout ce que* par **ĉio, kion**.

Ex. : Tout est perdu. *Ĉio estas perdita.* — Tout ce qui est  
 utile. — *Ĉio, kio estas utila.* — C'est tout ce que je voulais.  
*Estas ĉio, kion mi volis.*

— *Tout* dans le sens de *tout entier* se traduit par **tuta** et  
 dans le sens de *tout à fait* par **tute**.

Ex. : Cette maison est toute sa fortune. *Tiu domo estas sia  
 tuta riĉeco.* — Il a visité toute la France. *Li vizitis tutan  
 Francujon.* — Ses habits sont tout noirs. *Liaj vestoj estas tute  
 nigraj.* — La neige est toute blanche. *La neĝo estas tute blanka.*

REMARQUE : *Tout à coup* se traduit par **subite** ou **tuj**; *tout  
 d'un coup* par **per unu fojo**; *toutefois* par **tamen** et *toutes les  
 fois que* par **ĉiufoje kiam**.

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

Miaj fratinoj estis tute surprizitaj. Ĉiu lernanto havas siajn kajerojn. La folioj de la arboj defalas ĉiujare. Nomu ĉiujn literojn de tiu vorto. Viaj manoj estas tute malpuraj. Ĉio, kion vi faros, estos bone farita. Metu ĉiujn viajn librojn en vian sakon. Ĉiuj sonoriloj sonoris. La vetero estas tute griza kaj pluvema. Ĉiufoje kiam mia kuzo venas, ni promenas kune. Ĉu vi lernis ĉiujn viajn lecionojn? Ĉu vi faris tutan vian taskon? La herbaro estas jam tute seka. Ĉiu sezono havas siajn plezurojn. Mi legis ĉiujn librojn, kiujn vi prunte donis al mi. La kuracisto havis tute nigrajn vestojn. Ne eltrinku vian glason per unu fojo. Subite la tondro ekbruis. Subite silento fariĝis. Ĉiufoje kiam mi vidas novan libron esperantan, mi aĉetas ĝin.

## THÈME

Tout a un commencement et une fin. On ne pense pas toujours à tout. Tout pour moi et rien pour les autres, disent les égoïstes. Est-ce tout ce que vous désirez? Tout ce qui brille n'est pas or. Cet homme a perdu tout son argent. Le vent a soufflé toute la nuit, Toutes les pommes sont tombées des arbres. J'ai vu hier tous mes amis. Vous êtes tout pâle; êtes-vous malade? Il est tout heureux et tout fier de (*pro*) son succès. Personne ne peut apprendre toutes les langues vivantes. Tout le monde peut apprendre l'esperanto, qui est la langue auxiliaire universelle. Elle est toute simple et toute facile. Jules doit se lever tous les jours à six heures. Tous les matins on est obligé de le réveiller, car il ne se réveille jamais. Tout à coup le ciel se couvrit de nuages tout noirs, mais le vent les dispersa tout d'un coup. Ne dépensez pas votre argent tout d'un coup.

---

## TRENTE-DEUXIÈME LEÇON

### Manières de traduire : en.

#### Sano kaj malsano.

— Bonan tagon, Karolo. Jam de centjaro oni ne vidis vin. *Kiel vi fartas?*

— Mi dankas, Ernesto, tre bone. Mi estas gaja kaj vigla; mi havas bonan apetiton, mi dormas bone kaj mi estas kontenta je la ekzistado.

— Mi ne povas diri la samon. Mi estas ofte malsaneta; jen mi havas dentdoloron, jen kapdoloron. La lastan semajnon, mi malvarmumis kaj mi havis nazkataron, poste bronkiton, kaj mi tudas ankoraŭ iom. Vi estas feliĉa, ke vi havas tiel belan sanon. Sed, kiel fartas via fratino Ludovikino?



Mia fratino Ludovikino estas malsana. Ŝi kuŝas en lito pala kaj malvigla, kaj ŝi ne havas apetiton. Oni ne scias ankoraŭ, kiun malsanon ŝi havas. La kuracisto venis. Li ekzamenis la malsanulinon, li aŭskultis ŝin kaj palpis al ŝi la pulson. Nia

patrino estis tre maltrankvila, sed la kuracisto trankviligis ŝin. « La malsano ne estas danĝera, li diris, ŝed la malsanulino devas resti en lito, ŝi havas febron. Mi tuj ordonos al ŝi trinkaĵon kaj pilolojn. »

Mi portis la recepton en la apotekon, kaj la apotekisto donis al mi la kuracilojn. Ludovikino diras, ke la trinkaĵo estas maldolĉa, sed ŝi trinkas ĝin regule kaj konscience, ĉar ĝi devas resanigi ŝin. Nu, jen venas Johano. Kio nova, amiko mia? Ĉu oni fartas pli bone ĉe vi?

Danke. Mia patrino estas tute restarigita, sed mia malgranda fratino havas la morbilon, mia frato havas la variolon. Mia alia frato havis anginon, kaj nun li havas la skarlatinon. Ĉar tiuj malsanoj estas komunikeblaj, mi loĝas ĉe miaj geavoj.

#### QUESTIONNAIRE

1. Pri kio estas la demando en la dialogo tie ĉi supre? —
2. Kiom da knaboj parolas en ĝi? — 3. Pri kio demandas Ernesto Paŭlon? — 4. Kiel fartas Karolo? — 5. Ĉu li havas bonan apetiton? — 6. Ĉu li dormas bone? — 7. Je kio li estas kontenta? —
8. Kial Ernesto ne povas diri la samon? — 9. Kiel estas nomita la fratino de Karolo? — 10. Ĉu Ludovikino fartas tiel bone kiel ŝia frato? — 11. Ĉu oni scias, kian malsanon ŝi havas? — 12. Kiu venis por ekzameni la malsanulinon? — 13. Kion diris la kuracisto al la patrino? — 14. Kiu portis la recepton al la apoteko? — 15. Kion alportis Karolo el la apoteko? — 16. Kion vi scias pri la morbilo kaj la skarlatino?

#### GRAMMAIRE

##### Manières de traduire **en** :

— *En* mis pour *dans* se traduit par **en**; mis pour *de* il se traduit par **el**.

Ex. : En été, en l'année, *en somero, en la jaro*. — Mon ami est en France. *Mia amiko estas en Francujo*. — Il ira bientôt en Amérique. *Li iros baldaŭ en Amerikon*. — La table est en bois. *La tablo estas el ligno*.

— *En* signifiant *de lui, d'elle, d'eux, d'elles, de cela, de là* se traduit par le pronom ou l'adverbe correspondant accompagné de la préposition convenable.

Ex. : Il en est aimé. *Li estas amata de li, ŝi, ili.* — Vous en a-t-il parlé? *Ĉu li parolis al vi pri tio?* — Nous en venons. *Ni venas de tie.* — J'aime le vin et j'en bois, *Mi amas la vinon, kaj mi ĝin* (ou : *da ĝi*) *trinkas.*

— *En* accompagnant un participe présent forme avec ce dernier une locution adverbiale qui se traduit par le participe-adverbe terminé en *e*. (Voir leçon 25).

Ex. : En me promenant, *promenante.* — En lisant, *legante.*

#### LEXICOLOGIE

#### La kuracisto ekzamenis la malsanulon.

— Le suffixe *ul* indique l'être caractérisé par la qualité qu'exprime la racine.

Ex. : *Juna*, jeune ; *la junulo*, le jeune homme. — *Riĉa*, riche ; *la riĉulo*, le riche. — *Timo*, crainte ; *la timulo*, le poltron. — *Sano*, bien portant ; *la sanulo*, l'homme bien portant. — *Maljuna*, vieux ; *la maljunulo*, le vieillard.

#### Exercices oraux ou écrits.

Formez avec les mots suivants des dérivés en *ul* et employez-les dans de petites phrases :

Petoli — kredi — kampo — krimo — bona — ftizo — fremda — ambicia — antaŭa — poste — drinkema — malsaĝa — babili — avara.

#### VERSION

Mi gratulas vin pri tio. Mi dankas vin pro tio. Mi estas certa pri tio. Mi havas sufiĉe da ĝi. Vi donis al mi tro da ĝi. Mi ne aŭdis paroli pri li. Ni foriris de tie ĝuste kiam ili alvenis. Forĝante oni fariĝas forĝisto. Lernante oni fariĝas instruitulo. Ĉiuj miaj kamaradoj estas miaj egaluloj. Ĉu vi vidis riprezenti « la Homevitulon ». Dunan estis fama homamulo. La rajto de la plifortulo estas ĉiam

la plej bona. Tiu ekleziulo estas maniulo. La blinduloj estas malfeliĉaj. Falante ŝi rompis al si la brakon. Forirante, ni kisis niajn gepatrojn. Alproksimiĝante, mi vidas birdon en nesto. La infano alvenis kurante. Ĝemante marŝis la maljunulo. Mi malpurigis ludante miajn manojn. Malriĉulo penadas ofte imiti riĉulon. Cikado pasis la tutan someron kantadante. Kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej riĉa. Inter la blinduloj reĝas la strabuloj.

## THÈME

Dans la chambre se trouvaient plusieurs vieilles chaises en bois. En été les jours sont longs, en hiver ils sont courts. Toutes les montres ne sont pas en or. En allant à l'école je suis tombé. J'ai rencontré mon ami en revenant de Paris. Ce jeune homme a été pendant deux ans en Allemagne. Je n'en ai jamais entendu parler. Mon oncle a été pendant deux ans en Amérique; il en est revenu hier. Si je n'aimais pas le vin, je n'en boirais pas. Si vous aimez les fraises, mangez-en tant que vous voulez. J'ai vu de belles poires et j'en ai acheté deux douzaines. Donnez-m'en la moitié, je vous prie. Avez-vous des nouvelles du (*pri*) malade? Oui, j'en ai reçu ce matin; il va mieux. La rougeole peut être dangereuse; on peut en mourir. Avez-vous beaucoup d'amis comme lui? Il y en a peu comme lui. Est-ce que votre frère est remis de sa bronchite? Voici des pilules; prenez-en quatre par jour.

---

## TRENTE-TROISIÈME LEÇON

### Manières de traduire : y, il y a.

#### La urbo.

En la urbo, la domoj estas grandaj, altaj kaj belaj. Ili havas pli ol unu etaĝo. En la grandaj urboj estas ses- kaj sepetaĝaj domoj. La homoj, kiuj loĝas en la urbo, la loĝantoj de la urbo, estas urbanoj.

La domoj tuŝiĝas kaj faras longajn vicojn, kiuj enkadrigas la stratojn kaj placojn. La stratoj kaj placoj estas pavimitaj. La pavimo estas kutime el ŝtono, sed multaj stratoj estas pavimitaj per ligno aŭ asfalto. Sur la placoj oni vidas ĝenerale monumenton aŭ fontanon, aŭ la statuon de viro fama. Oni akvumas kaj balaas ofte la stratojn kaj placojn por purigi ilin.

La du flankoj de la strato, la trotuaroj, estas rezervitaj al piedirantoj. La mezo, la ŝoseo, estas rezervita al veturiloj. Laŭlonge de la trotuaroj staras gaslanternoj, kiujn oni ekflamigas vespere por lumigi la stratojn. Multaj urboj estas hodiaŭ lumigitaj per la elektra lumo.

La urbo estas dividita je kvartaloj. Parizo enhavas dudek kvartalarojn, kiuj enhavas po tri aŭ kvar kvartaloj. Mi loĝas en unu el la plej belaj kvartaloj de la urbo.

Urbo, kiu havas multajn fabrikojn estas industria urbo. Roubaix en Francujo, Manchester en Angl-



ujo, Barmen en Germanujo estas industriaj urboj. Se, male, estas en urbo multaj komercistoj, kiuj faras grandan komercon, la urbo estas komerca urbo: Londono en Anglujo, Leipsigo en Germanujo estas komercaj urboj. Fine, urbo, kiu kuŝas sur la bordo de la maro, estas apudmara urbo, ofte haveno. Marseille kaj Hamburgo estas marhavenoj.

La plej granda urbo en lando, aŭ tiu, en kiu loĝas la ŝtatestro kaj la superaj aŭtoritatoj de la lando estas ĉefurbo. Parizo estas la ĉefurbo de Francujo.

#### QUESTIONNAIRE

1. Pri kio temas tiu ĉi legaĵo? — 2. Parolu pri la domoj de la urbo. — 3. Kiel oni nomas la homojn, kiuj loĝas en la urbo? — 4. El kio la domoj estas konstruitaj? — 5. Kiaj estas la stratoj kaj la placoj? — 6. El kio estas la strata pavimo? — 7. Kion oni vidas ofte sur la placoj? — 8. Kial oni akvumas kaj balaas la stratojn? — 9. Ĉu la veturiloj iras sur la trotuaroj? — 10. Kie troviĝas la gaslanternoj? — 11. Kial oni ekflamigas ilin vespere? — 12. Ĉu ĉiuj urboj estas lumigitaj gase? — 13. Kiel la urbo estas dividita? — 14. Kiel Parizo estas dividita? — 15. Kiom da kvartalaroj estas en Parizo? — 16. Ĉu la kvartaloj estas pli aŭ malpli multaj ol la kvartalaroj? — 17. Kio estas industria urbo? — 18. Kiam oni nomas urbon komerca? — 19. Kio estas mara urbo? — 20. Nomu urbon industrian, urbon komercan, urbon maran. — 21. Kio estas ĉefurbo? — 22. Kiu estas la ĉefurbo de Francujo?

#### GRAMMAIRE

##### Manières de traduire y, il y a :

— *Y* signifiant *là* se traduit par **tie** quand on y est et par **tien** quand on y va.

Ex. : Je n'y ai pas été. *Mi ne estis tie.* — Nous y irons demain. *Ni iros tien morgaŭ.*

— *Y* signifiant à *lui*, à *elle*, à *cela* se traduit par le pronom correspondant accompagné de la préposition convenable.

Ex. : *Y* consentez-vous ? *Ĉu vi konsentas pri tio?* — Je n'y pense pas (à elle). *Mi ne pensas pri ŝi.*

— *Il y a* se traduit généralement par **estas** ; mais avec un complément de temps par **antaŭ**.

Ex. : Il y a des hommes, qui... *Estas homoj, kiuj...* — Y a-t-il beaucoup de cerises ? *Ĉu estas multaj ĉerizoj?* — Il est venu il y a huit jours. *Li venis antaŭ ok tagoj.* — Il y a six mois qu'il est parti. *Li foriris antaŭ ses monatoj.*

#### LEXICOLOGIE

La loĝantoj de la urbo estas urbanoj. — La ŝtatestro loĝas en la ĉefurbo.

— Le suffixe **an** désigne le membre, le partisan, l'habitant.

Ex. : *Societo*, société ; *Societano*, sociétaire. — *Parizo*, Paris ; *Parizano*, parisien. — *Grupo*, groupe ; *Grupano*, membre de groupe.

— Le suffixe **estr** désigne le chef.

Ex. : *Urbo*, ville ; *Urbestro*, maire. — *Ŝtato*, État ; *Ŝtatestro*, chef d'État.

#### Exercices oraux ou écrits.

Formez avec les mots suivants des dérivés en **an** et en **estr** et employez-les dans de petites phrases :

1° **an** : vilago — provinco — Londono — regno — Kristo — klubo — grupo — senato — polico — ideo — Romo — kamparo.


2° **estr** : ofico — regimento — polico — vilago — ŝipo — muziko.

## VERSION

En la grandaj urboj estas altaj domoj. Estas multe da fruktoj tiun ĉi jaron. Antaŭ du semajnoj mi vidis la urbestron. Antaŭ du jaroj, ni estis nur ses grupanoj, hodiaŭ ni estas okdek. Ĉiuj esperantistoj estas samideanoj. Ĉiuj instruistoj ne estas lernejestroj. La Angloj estas insulanoj tial ke ili loĝas en insulo. Eĉ malsaĝaĵo povas havi partianojn. Mi ne povos iri tien. Mi estas tie, mi tie restas. Mi nenion povas pri tio. Mi nenion sciigis pri tio. Ĉu via patrino estas tie ?

## THÈME

Allez-vous souvent à Paris ? J'y ai été le mois dernier et j'y retournerai le mois prochain. Quand j'y suis, je vais tous les soirs au théâtre. Il y a beaucoup de villes qui ont plusieurs centaines de mille d'habitants. Le pavé de cette rue est bien (*tre*) mauvais. Paris est une belle ville ; on y voit de grandes places, de larges rues, beaucoup de monuments, des parcs et des jardins publics. Allons sur l'autre trottoir ; on y marche plus aisément ; il y a moins de passants. Pensons-y toujours, mais n'en parlons pas. Il y a plus de six mois que je ne suis pas venu dans ce quartier. Le maire de la ville est mort il y a trois semaines.



## TRENTE-QUATRIÈME LEÇON

**Manières de traduire : celui qui, dont, où.**

### Priskribo de bildo.

Tiu ĉi bildo prezentas urbon. Tiu urbo kuŝas sur la rivero, kiu malsupreniras el la altaĵoj, kiujn oni vidas en la fundo, kaj serpentfluas tra la urbo. La rivero havas du bordojn, kiuj estas enigitaj per ŝtonaj muroj.

Antaŭe mi vidas ponton, kiu kondukas de unu bordo al la alia. Sur tiu ponto, mi rimarkas kelkajn personojn : unue almozulon, kiu sidas apud la parapeto. Ĝi estas malriĉa kaj maljuna blindulo ; li havas hundon, kiu lin gvidas. Li portas surskribon sur la brusto kaj ĉapelon en la mano ; li petas la preterirantojn pri almozo, li almozpetas. Proksime je li mi vidas policanon. Homo, kiu portas paketojn, demandas lin pri ia sciigo. Poste venas telegrafisteto, kaj enspekto, kiu ekmarŝas sur la ponton por iri al alia bordo. En la angulo kaj iom dekstre, librovendisto vendas maljunajn maloftajn librojn al la amatoroj. Sur tiu sama ponto mi vidas ankaŭ homon, kiu portas gazetojn, gazetvendiston, gaslampon kaj vojzorgiston, kiu akvumas la pavimon.

Pli malproksime, supre, troviĝas alia ponto. Tio estas ŝtona ponto. Ĝi havas du arkaĵojn kun kolonego en la mezo, sur kiu oni vidas la insignojn de la urbo. Tiu ponto kondukas al la stacio, kiun oni vidas maldekstre. Inter la du pontoj, dekstre,

haltadas platŝipo, apud la enŝipejo. Sur la kajo kuŝas diversaj komercaĵoj, kiuj estas ŝarĝotaj sur la ŝipon. Vaporŝipo pasas ĝuste sub la ponto. La veturantoj sidas sur la ferdeko, kaj malantaŭe troviĝas la direktilisto ĉe la direktilo. Li direktas la ŝipon. Trans la ponto, multe pli supre, mi vidas lavŝipon aŭ naĝejon kaj alian vaporŝipon. Tiu ĉi estas trenŝipo kaj li trenas kelkajn barkojn.

Sur la strato mi vidas multajn veturilojn. En la grandaj urboj fiakroj, omnibusoj, tram(voj)oj, komercveturiloj kaj ŝarĝveturiloj kruciĝas de frue matene ĝis malfrue nokte. Inter ĉio tio, la bicikledoĵoj aŭ la tricikledoĵoj aŭ la aŭtomobiloj akre bruas. Ĝi estas ofte tiel granda tumulto, ke oni apenaŭ sian propran parolon aŭdi povas.

Sur la teretaĝo de la plejmulto de la domoj estas tre diversaj butikoj. Jen oni vidas tolaĵvendejon, jen ĉapelvevendejon, jen horloĝvendejon, jen restoracion, jen bankon kaj multajn aliajn plu.

#### QUESTIONNAIRE

1. Kion prezentas tiu bildo ? — 2. Kie kuŝas tiu ĉi urbo ? —
3. De kie venas tiu rivero ? — 4. Kiamaniere ĝi trafluas la urbon ? —
5. Kiaj estas la bordoj de la rivero ? — 6. Kiom da pontoj vi vidas super la rivero ? — 7. Kion vi rimarkas sur la ponto antaŭa ?
8. Kio estas tiu viro sidanta apud la parapeto ? — 9. Kion vi vidas sur lia brusto ? — 10. Ĉu li havas ĉapelon sur la kapo ? — 11. Kial li tenas sian ĉapelon en la mano ? — 12. Kiaj estas la aliaj personoj proksime je li ? — 13. Kion vi vidas en la dekstra angulo de la ponto ? — 14. Diru, kion vi vidas ankaŭ sur tiu sama ponto ? —
15. Parolu pri la alia ponto. — 16. Kien kondukas aŭ irigas la ponto ? — 17. Kiom da ŝipoj vi vidas sur la rivero ? — 18. Kion

vi vidas sur la ŝipo, kiu pasas sub la ponto? — 19. Kio estas trenŝipo? — 20. Kiajn veturilojn oni vidas en la strato? — 21. Kio rezultas el la multeco de tiuj veturiloj? — 22. Kion oni vidas sur la teretaĝo de la plejmulto de la domoj? — 23. Nomu kelkajn specojn de butikoj.

GRAMMAIRE

Manières de traduire celui qui (que), dont, où.

— *Celui qui*, se traduit par **tiu**, **kiu**.

Ex. : Celui qui lit s'instruit. *Tiu, kiu legas, instruas sin.* — Je prends celle qui est près de moi. *Mi prenas tiun, kiu estas apud mi.* — Prenez ceux que vous voudrez. *Prenu tiujn, kiujn vi volos.*

— *Dont*, à qui, se traduit par **kies**, sans article, quand il marque une idée de possession.

Ex. : L'homme dont la maison a brûlé... *La homo kies domo brulis...* — La femme dont vous avez acheté la maison... *La virino, kies domon vi aĉetis...* — A qui est ce jardin? *Kies estas tiu ĉi ĝardeno?*

— *Dont*, sans idée de possession, se traduit par **kiu**, précédé d'une préposition, (généralement *pri*, *de* ou *el*).

Ex. : L'affaire dont je vous ai parlé... *La afero, pri kiu mi parolis al vi...*

— *Où*, pronom, remplaçant lequel précédé d'une préposition, se traduit par **kiu** ou **kio**.

Ex. : Le pays d'où je viens. *La lando, el kiu mi venas.* — Le jour où je suis arrivé. *La tago, en kiu mi alvenis.* — D'où nous pouvons conclure... *El kio, ni povas konkludi...*

— *Où* se traduit par **kie** quand il marque le lieu et par **kiam** ou **en kiu** quand il marque le temps.

Ex. : Où avez-vous été? *Kie vi estis?* — Où est-il allé? *Kien li iris?* — Jusqu'au jour où... *Ĝis la tago, kiam...* — Le temps où nous vivons... *La tempo en kiu ni vivas...*

## Exercices oraux ou écrits.

## VERSION

Tiu, kiu volas, povas. Tiu ĉi libro ne estas tiu, kiun mi legis. Kies domo estas tiu ĉi? Jen estas ĉiuj miaj libroj; legu tiujn, kiujn vi volos. Se vi amas la florojn, prenu ĉiujn tiujn, kiuj plaĉos al vi. Tio, kio pasis, ne revenos. Tion, kion Parizo aplaŭdis, ofte Berlino mallaŭdas. [Tiu], kiu havas forton, havas rajton. [Tiu], kiu multe minacas, ne estas danĝera. [Tiuj], kiuj ludas kun koto, malpurigas la manojn. La momento, en kiu mi parolas, estas jam malproksime de mi. Ĉu vi konas la junulon, kies gepatroj loĝas tie ĉi? Ĉu vi forgesis tiujn, de kiuj vi estas tiom amata? La familio el kiu eliras tiu komercisto estas tre estimata. Mi perdis la libron, pri kiu mi parolis al vi. Memoru tion, pri kio mi hieraŭ parolis al vi.

## THÈME

De quel livre parlez-vous? De celui que vous avez acheté ou de celui que je vous ai donné? Cette rivière-ci est plus large et plus profonde que celle qui traverse notre ville. On voit beaucoup de mendiants; ils sont tous infirmes; celui qui est assis sur le trottoir du pont là-bas est aveugle. L'homme que vous voyez à côté de lui avec des journaux sous le bras est un marchand de journaux. La ville dont nous parlons est située sur une petite rivière. Les enfants dont les parents meurent de bonne heure sont à plaindre. Voici le monsieur dont vous avez vu le fils ce matin. Voulez-vous me dire où on vous a acheté cette montre? Demandez à cet homme qui il est, d'où il vient, et où il va. Je serai obligé de travailler jusqu'au jour où je ne pourrai plus rien faire. Connais-tu le pays où fleurit l'oranger? C'était à l'époque où son grand père vivait encore.



## TRENTE-CINQUIÈME LEÇON

### Récapitulation des déterminatifs simples.

#### Mia strato.

Mia strato ne estas tiel bela, kiel bulvardo kun belegaj magazenoj aŭ kiel arbostrato. Ĝi enhavas nek palacojn nek luksajn domojn. Ĝi eble ne estas tiel vivplena, kiel tiu ĉi aŭ tiu strato de la kvartalo, sed la vivo ne mankas en ĝi kaj la laborado haltas neniam.

Matene, frue, oni aŭdas la seruriston bati la feron; oni vidas la paniston kaj la buĉiston saluti la karbiston, kaj la fruktvendistinon elmeti la provizojn, kiujn ŝi alportis de la haloj. Tie ĉi loĝas la tajloro, ĉe kiu mi igas fari la vestojn; tie la ŝuisto, kiu faras miajn ŝuojn, kaj kontraŭe troviĝas la butikisto de la spicisto, ĉe kiu ni aĉetas la kafon, la sukeron, la salon, la pipron kaj la kandelon.

Apud la vestpurigisto loĝas la kukisto, ĉe kiu mia patrino aĉetas bonegajn pasteĉetojn kaj la fadenistino, kiu vendas fadenon, kotonon, rubandojn, pinglojn kaj kudrilojn. Pli malproksime troviĝas la butikisto de la laktovendistino, kiu sendas al ni lakton, buteron, fromaĝon kaj ovojn, kaj apud ŝi, ĉe unu flanko la kolorilvendisto kaj ĉe la alia la ladvendisto, kiu vendas tranĉilojn, forketojn, najlojn kaj aliajn ferajn objektojn.

Jen la ĉapelisto staras antaŭ sia pordo kun la tapetisto, sia najbaro. La horlogisto malfermas

sian montrofenestron, kaj la kombisto havas jam kelkajn klientojn en sia butikoj. La lavistino gladas la tolaĵojn de siaj klientoj; la kudristino sidas antaŭ sia kudromaŝino, kaj la modistino rapidas por fini ĉapelon, kiun ŝi devas tuj liveri. Fine, ĉe la angulo, vi vidas ĉe unu flanko la porkaĵiston, kaj ĉe la alia la paperiston, kie mia patro aĉetas ĉiumatene sian gazeton.

## QUESTIONNAIRE

1. Ĉu via strato estas plantita per arboj? —
2. Ĉu ĝi enhavas riĉegajn magazenojn kaj luksegajn palacojn? —
3. Ĉu ĝi estas tiom vivplena, kiom aliaj stratoj de la kvartalo? —
4. Ĉu ĝi ne havas vivecon? Ĉu viveco mankas al ĝi? —
5. Kio neniam mallaboras en ĝi? —
6. Kion oni aŭdas matene frue? —
7. Kion faras la viandisto kaj la panisto? —
8. De kie la legomvendistino serĉis siajn provizojn? —
9. Kion vi igas fari ĉe la tajloro? —
10. Kie vi aĉetas viajn ŝuojn? —
11. Kia magazeno troviĝas kontraŭ via ŝuisto? —
12. Kion vi aĉetas ĉe la spicisto? —
13. Kie loĝas la kukisto? —
14. Kion aĉetas via patrino ĉe la kukisto? —
15. Kion vendas la merceristino aŭ fadenistino? —
16. Kia butikoj troviĝas pli malproksime? —
17. Kion la laktovendistino sendas al vi? —
18. Kiu loĝas apud ŝi? —
19. Kiu estas la najbaroj de la tinkturisto? —
20. Kion faradas la lavistino?... la modistino? —
21. Kie via patro aĉetas sian ĵurnalon?

GRAMMAIRE

Récapitulation des déterminatifs simples.

Individualité	Neutre	Qualité	Possession
— <b>iu</b> quelqu'un	— <b>io</b> quelque chose	— <b>ia</b> quelque, un certain, une espèce de	— <b>ies</b> de quelqu'un, à quelqu'un
<b>kiu</b> qui, lequel	<b>kio</b> quoi	<b>kia</b> quel, quelle sorte de	<b>kies</b> de qui, à qui
<b>tiu, tiu ĉi</b> ce, celui-là, celui-ci	<b>tio</b> cela	<b>tia</b> tel	<b>ties</b> d'un tel, à un tel
<b>ĉiu</b> chaque, cha- cun, tout	<b>ĉio</b> tout	<b>ĉia</b> chaque, de chaque espèce, toute espèce de	<b>ĉies</b> de chacun, à chacun
<b>neniu</b> ne... personne	<b>nenio</b> rien	<b>nenia</b> ne... nul, au- cune espèce de	<b>nenies</b> ne... de per- sonne

REMARQUE : Il ne faut pas oublier que les mots qui commencent par *neni* sont négatifs par eux-mêmes et qu'ils ne doivent par conséquent jamais être accompagnés de la négation **ne**.

VERSION

Ĉu iu el vi lernas esperanton? Ni ĉiuj lernas fervore esperanton. Neniu estas kontenta pri sia sorto. Neniu eliru kaj ĉiuj silentu. Kian supon ni mangos tiun ĉi vesperon? Li pasigas la tutan tagon fumante, farante nenion. Ni havas en nia ĝardeno ĉiajn fruktojn. Vi povas iri tien sen ia timo. Ĉies amiko, nenies amiko. Apud plena mangotablo

ĉiu estas tre afabla. Al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas. Kia la semo, tia la rikolto ; kia ago, tia pago. Ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo. Kia drapo, tia vesto. Ĉiu havas sian propran guston. Neniu estas profeto en sia patrolando. En Islando kreskas nenia frukto. Mono perdita, nenio perdita ; honoro perdita, ĉio perdita. Kion ni ne konas, tion ni ne deziras. Ĉiu komenco estas malfacila.

## THÈME

Quelqu'un est-il venu pendant mon absence? Non, monsieur, personne n'est venu. Cet homme est insupportable, il trouve toujours quelque chose à critiquer. Prenez du papier quelconque. Qu'avez-vous entendu? Nous n'avons rien vu et rien entendu. Quel porte-monnaie avez-vous trouvé, un noir ou un brun? Lequel de vous, jeunes gens, a perdu ce couteau-ci? Ce doit être le couteau de quelqu'un. Je me demande à qui il peut être. Cela n'est pas possible. Il n'y a qu'un tel élève qui peut faire un tel devoir. Personne ne peut dire : je sais tout. Chacun doit obéissance à la loi. Chaque maison a son propriétaire. L'église est la maison de chacun. Il n'avait nulle idée. La laitière nous apporte tous les matins du lait et du beurre. Est-ce que le teinturier a nettoyé ma veste et mon pantalon? Ils sont nettoyés, mais pas encore repassés. Nous achetons le fil, les aiguilles et les épingles chez la mercière.

## TRENTE-SIXIÈME LEÇON

### Récapitulation des adverbess simples.

#### La publikaj konstruaĵoj.

En la urbo estas ne nur loĝdomoj, sed ankaŭ kasteloj, palacoj kaj ĉiuj specoj de publikaj konstruaĵoj, kiuj havas ĉiuj sian specialan difinon.

En la urbdomo kunvenas la urba konsilantaro sub la prezido de la urbestro, aŭ, ĉe lia neĉeesto, de la vicurbestro, por diskuti pri la interesoj de la urbo. En la juĝpalaco aŭ la juĝejo la advokatoj defendas la kulpigitajn. La juĝoj aŭskultas la atestantojn kaj la pledon de la advokato kaj elparolas sian juĝon. Ili senkulpigas aŭ kondamnas la kulpigiton laŭ tio, ke li estas montrita senkulpa aŭ kulpa.

En la teatro ni vidas aktorojn kaj aktorinojn sur la scenejo, kie ili deklamas aŭ kantas sian rolon. En la muzeo estas ekspoziciitaj pentraĵoj, statuoj kaj ĉiuj specoj de artaj, antikvaj aŭ kuriozaj objektoj. En la ĉefpreĝejo kaj la preĝejoj, la pastroj faras la religian servadon. En la gimnazio, en la liceo kaj en la lernejoj la profesoroj kaj la instruistoj instruas la infanojn, knabojn kaj knabinojn. En la malsanulejo la kuracisto kaj la flegistoj aŭ flegistinoj flegas la malsanulojn kaj kriplulojn. La soldatoj loĝas en la soldatejo.

#### QUESTIONNAIRE

1. Ĉu estas nur loĝdomoj en la urbo? — 2. Kiu kunvenas en la urbdomo? — 3. Kial la urba konsilantaro kunvenas? — 4. Kion faras la advokatoj kaj juĝistoj en la juĝejo? — 5. Kial ni iras en

la teatron ? — 6. Kion oni vidas en muzeo ? — 7. Kion oni faras en la preĝejo ? — 8. Kio estas gimnastikejo ? — 9. Kio estas gimnazio aŭ liceo ? — 10. Kiuj estas en la malsanulejo ? — 11. Kiu flegas la malsanulojn ? — 12. Kie loĝas la soldatoj ?

## GRAMMAIRE

## Récapitulation des adverbessimples.

Lieu	Temps	Manière	Cause	Quantité
<b>ie</b> quelque part	<b>iam</b> un jour	<b>iel</b> d'une façon quelconque	<b>ial</b> pour une raison quelconque	<b>iom</b> quelque peu, un peu
<b>kie</b> où	<b>kiam</b> quand	<b>kiel</b> comment	<b>kial</b> pourquoi	<b>kiom</b> combien
<b>tie</b> , là ; <b>tie ĉi</b> , ici	<b>tiam</b> alors	<b>tiel</b> ainsi, si	<b>tial</b> c'est pour- quoi, parce	<b>tiom</b> autant
<b>ĉie</b> partout	<b>ĉiam</b> toujours	<b>ĉiel</b> de toutes façons	<b>ĉial</b> pour toutes les raisons	<b>ĉiom</b> le tout
<b>nenie</b> ne... nulle part	<b>neniam</b> ne... jamais	<b>neniel</b> ne... nulle- ment	<b>nenial</b> ne.. pour au- cune raison	<b>neniom</b> ne... rien du tout

REMARQUE : Même observation qu'à la leçon précédente pour les mots commençant par **neni**.

## VERSION

Mi ne povis trovi mian plumingon ie en la ĉambro, aŭ : mi nenie povis trovi mian plumingon en la ĉambro ; ĉu vi kaŝis ĝin ien ? Nun la esperantistoj trovas ĉie samideanojn. Tian komercaĵon oni povas aĉeti ĉie. Kie estas la poŝtoŝejo ? Kien veturas tiu

ĉi vagonaro? Mi iras tien. Kie ajn li estas, mi trovos lin. Ĉu via onklo estis hieraŭ tie ĉi? Li estas neniam kontenta. Oni devas esti ĉiam ĝentila. Kiam li venos, vi sendu lin tuj al mi. Kiel vi fartas? Venu kiel eble plej baldaŭ. Li ne estas tiel granda, kiel mi. Mi aprobas lin neniel. Kial vi ne venis hieraŭ? Ial li subite forlasis Parizon. Li estas laborema; tial mi rekompencos lin. La vetero estas iom pli malvarma ol hieraŭ. Jen estas kuko, prenu iom da ĝi, sed ne prenu ĉiom. Kiom da literoj havas tiu vorto? Kiom da loĝantoj estas en Parizo? Mi deziras tiom da akvo, kiom da vino. Lupo ĉiam serĉas arbaron. Li mensogas, kiel gazeto. Li mensogas tiel, ke la muroj krakas. Prenu [tiom] kiom vi volas. Ne ĉiam estas festo. Kiom da homoj, tiom da opinioj. Kiel oni sternas, tiel oni dormas. Kie pano estas, tie musoj ne mankas. Kie maldike estas, tie rompiĝas.

THÈME

J'ai entendu cela quelque part, mais je ne sais plus où? Un jour nous étions assis là avec nos amis. A-t-il dit cela pour une raison quelconque? Cet homme est quelque peu oublieux; il devrait se corriger d'une façon quelconque. Où étiez-vous donc hier? Je vous ai cherché partout et ne vous ai trouvé nulle part. Quand il pleut nous restons toujours chez nous. Cela est si facile que je ne sais pas comment on peut ne pas comprendre. Pourquoi votre ami n'est-il pas venu avec vous? Il est resté chez lui parce qu'il était indisposé. Je n'ai nullement faim. Il ne le ferait pour aucune raison. Portez votre lettre à la poste et dépêchez-vous, si vous voulez qu'elle parte aujourd'hui.

## TRENTE-SEPTIÈME LEÇON

### Prépositions employées comme préfixes.

#### La poŝto.

— Vi deziras sendi leteron al amiko, kiu loĝas en Marseille. Nenio estas pli facila. Sufiĉas skribi la leteron, enmeti ĝin en koverton, surskribi la adreson, kaj algluigi poŝtmarkon. Tiel la letero estas afrankita, kaj vi povas nun meti ĝin en la poŝtkeston.

— Tamen, kiel tiu letero iros ĝis Marseille?

— Aŭskultu. Tuj poŝtisto venos malplenigi la keston. Li portos la leterojn en la poŝtoŝtacion. Tie, aliaj poŝtoŝtacionistoj dispecigas, stampas kaj ordigas ilin laŭ la adreslokoj, poste metas ilin en sakojn, kiujn ili ekspedas per la fervojo.

— Mi komprenas. Mia letero iras per fervojo ĝis Marseille. Sed, tiam, kiel ĝi trovos la domon de mia amiko!

— Tiam la sako en kiu troviĝas via letero estos portita en la Marseille'an poŝtoŝtacion, poŝtisto prenos ĝin kaj portos ĝin al via amiko.

— Tio estas mirinda. Tamen, kio okazus se mi ne afrankus mian leteron?

— Via letero estus malgraŭ tio ekspedita. Sed ĝi estus supertaksita kaj via amiko devus pagi duoblan transportan pagon.

— Kaj se, neatente, mi afrankus ĝin nesufiĉe?

— Tiam, ĝi estus aldone taksita je duoblo de la valoro de la mankantaj poŝtmarkoj.



— Ĉu la poŝto ekspedas nur leterojn ?

— Ĝi ekspedas ankaŭ poŝtkartojn, gazetojn, ĉiuspecajn presaĵojn, poŝtajn paketojn kaj eĉ monon.

— Tamen, se la mono perdiĝas dum la vojo ?

— Kiam oni sendas monon per letero, oni igas enskribi ĝin, oni deklaras la valoron, kaj la poŝto garantias ĝin.

— Kiam la letero estas urĝa, ĉu oni povas alvenigi ĝin pli rapide ?

— En tiu okazo, oni iras al telegrafejo, kaj oni sendas telegramon aŭ depeŝon. Oni eĉ povas telefoni.

#### QUESTIONNAIRE

1. Al kiu vi deziras sendi leteron ? — 2. Kie loĝas via amiko ?
- 3. Ĉu estas malfacile sendi leteron ? — 4. Kion sufiĉas fari ? —
5. Kion oni devas fari por afranki leteron ? — 6. Kion vi faras, kiam la letero estas skribita kaj afrankita ? — 7. Kiel via letero eliros el tiu ĉi kesto kaj iros ĝis Marseille ? — 8. Kio okazus se vi forgesus afranki ĝin ? — 9. Ĉu la poŝto ekspedas nur leterojn ?
- 10. Kion oni devas fari, kiam oni sendas monon per letero ?
- 11. Kial estas konsilinda enskribigi ĝin kaj deklari la valoron ?
- 12. Por kio servas aŭ utilas la telegrafo kaj la telefono ?

#### GRAMMAIRE

##### Prépositions employées comme préfixes.

<b>al</b>	à, vers	<b>aldoni</b> , ajouter ; <b>alporti</b> , apporter.
<b>antaŭ</b>	avant, devant	<b>antaŭdiri</b> , prédire ; <b>antaŭiri</b> , précéder.
<b>de</b>	de (point de départ)	<b>deveni</b> , provenir, venir de ; <b>deiri</b> , s'éloigner.
<b>el</b>	de (sortir, parachèvement)	<b>eliri</b> , sortir ; <b>ellabori</b> , achever.
<b>en</b>	dans, en	<b>eniri</b> , entrer ; <b>enhavi</b> , contenir ; <b>enskribi</b> , inscrire.

<b>for</b>	loin, au loin	<b>foresti</b> , être absent ; <b>foriri</b> , s'éloigner.
<b>inter</b>	entre, parmi	<b>interparoli</b> , causer ; <b>intersanĝi</b> , échanger.
<b>kontraŭ</b>	contre, en face	<b>kontraŭdiri</b> , contredire ; <b>kontraŭstari</b> , s'opposer.
<b>kun</b>	avec, en compagnie de	<b>kunveni</b> , se réunir ; <b>kunlabori</b> , collaborer.
<b>per</b>	par, au moyen de	<b>perlabori</b> , obtenir par son travail.
<b>preter</b>	oultre, plus loin	<b>preterpasi</b> , dépasser.
<b>pri</b>	concernant	<b>pripensi</b> , réfléchir à... ; <b>pri-skribi</b> , décrire.
<b>sen</b>	sans	<b>senzorgema</b> , négligent ; <b>senigi</b> , priver de ; <b>senvestigi</b> , déshabiller.
